

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

102-a jaro • n-ro 1222 (2) • **Februaro 2009**

Kiel fartas niaj novjaraj festivaloj?



**Zamenhof-
jaro 2009**

**Bjalistoko,
la ĉefurbo**

**Zamenhof-
tago**

**Ĉu ekzistas
la ĉina lingvo?**

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio

☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,50.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

- 27 ... Malferme: IS – ĉu ni povos ĝin forgesi? (Gunnar Fischer)
28 ... Kiel fartas niaj novjaraj festivaloj? Internacia Seminario (Marek Blahuš)
29 ... Internacia Festivalo, sed ne nur... (Claude Nourmont)
30 ... IVU dum IF (Amri Wandel)
31 ... Novjara Renkontiĝo (Lu Wunsch-Rolshoven)
32 ... Ĉu la lasta Ago-Semajno? Verŝajne JES! (Peter Baláž)
33 ... Transjara Martelado en Japanio (Roman Dobrzyński)
34 ... Zamenhof-jaro 2009: Neŭtrala lingvo kaj nova humanisma etiko – la celado de d-ro L.L. Zamenhof (Andreas Künzli)
36 ... 94-a Universala Kongreso: Bjalistoko, la ĉefurbo de Podlaĥio (Gabi Kosiarska, Barbara Pietrzak)
38 ... Recenzoj: Carlo Minnaja pri *Alia Venecio* kaj *Mediterranea brevierio*
39 ... Sten Johansson pri *Ĉu vi konas Blaise Cendrars*? Klaus Schubert pri *Esperanto-Terminologie und Terminologiearbeit*
40 ... Jorge Camacho pri *Hodler en Mostar*
41 ... Zamenhof-tago: Bjalistoko (Andreas Sochacki); Dublino (Garbhan MacAoidh); Rio-de-Ĵanejro (Aloísio Sartorato)
42 ... La 10-a Tago de la Gepatra Lingvo (Barbara Pietrzak); Anoncetoj; Kotiztabelo de UEA por 2009
43 ... Forumo: Kaj tiuj kiuj arde deziras esti membroj (Loes Demmendaal)
44 ... Ĉu ekzistas la ĉina lingvo? (Augusto Casquero)
45 ... Du novaĵoj el la Esperanto-urbo (P. Zilvar, H. Mantz, H. Schicke kaj Zs. Kóródy)
46 ... Oficiala informilo; Statistiko de la UK: Bjalistoka UK superis la unuan milon

KOVRILPAĜE: La finna espobando Dolchamar riĉigis per sia melodia rokmuziko eĉ du samtempe okazantajn jarŝanĝajn aranĝojn: post du koncertoj en Slovakio, dum Ago-Semajno, ĝi vojaĝis al Germanio por koncerti en Internacia Seminario (legu pli sur la p. 27, 28, 32). Foto: Ivo Miesen.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU, Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road, IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2359 7731; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj):
D-ro ing. Ranieri Clerici, Via Conte Verde 66, IT-00185 Roma, Italio;
☎ +39 333 255 19 04, ✉ +39 06 97 600 326;
✉ ranieri.clerici@tin.it.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa 38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa,

Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h],
✉ +48 6000 51 425; ✉ bpietrzak@onet.eu.
Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes Demmendaal, Duikerlaan 160, NL-2903 AC Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20; ✉ l.a.demmendaal@planet.nl.
Landa kaj regiona agado: S-ro Hori Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27, JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken, Japanio;
☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ hori-zonto@water.sanmet.ne.jp.
Faka kaj scienca agado: S-ro José Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio;
☎ +56 65 256660 [h], +56 65 344606 [of],
✉ +56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.
Observanto de TEJO: S-ro Gregor Hinker.
Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

IS – ĉu ni povos ĝin forgesi?

La partoprenantoj de la 52-a Internacia Seminario (IS) kaj la 7-a Ago-Semajno (AS) havis komunan kialon por ĝoji duonan horon post la noktomezo: Oni anoncis, ke venontfoje ambaŭ aranĝoj okazos kune. Per la kunigo de la renkontiĝoj eviteblas la disiĝo de la amikaroj. Tamen restas por diri: kiom triste, ke eble finiĝas tradicio de pli ol duona jarcento, nome la IS.

Kio okazis al ĝi? La festado dum la silvestra balo okazis pli solene ol dum la pasintaj jaroj. La etoso entute estis pli bona. Krom la kutimaj programeroj, la organizantoj zorgis pri kokteloj kaj karaokeo kun Esperanto-kantoj. Aldone la domo ofertis saŭnon. La enirhalo kun siaj sidlokoj iĝis ĝuste tia centra renkontiĝejo, kiun sukcesa aranĝo bezonas. Koncertoj de Alejandro Cossavella, Inicialoj DC, Dolchamar kaj La Kuracistoj konsistigis la muzikan programon; dum alia vespero la ludo “Kiu volas iĝi milionulo?” distris la homojn.

Precipe mankis nur unu afero: partoprenantoj! Kun 138 personoj el 24 landoj, la pasinta IS iĝis la plej malgranda ekde komence de la 1980-aj jaroj. La nivelo de internacieco sufiĉis (pri la ekstereŭropaj devenlandoj vidu la raporton de Marek Blahuš).

Sendube la AS dum la pasintaj jaroj allogis kelkajn homojn, kiuj kutimis veturi al la IS. Per tio facile klarigeblas la ŝrumpo de la IS sub la regulaj 280-300 partoprenantoj, sed ne tiu sub la grava nombro de 200. Tio sufiĉintus por daŭrigi la Internacian Seminarion sen deficiito. La kerna problemo estas hejma: anstataŭ la kutimaj 100 germanoj venis nur 50, el ili ĉirkaŭ 30 junuloj. Tiurilate la AS ne estis konkurenco: al ĝi aliĝis manpleno da germanoj. Laŭ propra informo, fine de la jaro GEJ havis 250 ordinarajn membrojn. Kie ili estis? GEJ ne plu sukcesas konvinki grandan parton de sia membraro veni al la ĉefa aranĝo de sia asocio.

Certe laŭdindas nova internacia kunlaboro, sed tio ne kaŝu malagrablan veron: Ĝi ne okazas libervole, sed rezultas el la malforteco de GEJ. Jam de jaroj la ĉefa organizanto de la IS

estas ne-germano, kiu ankaŭ ne loĝas en Germanujo. La brito Rolf Fantom faris sian laboron bone. Ke li devis transpreni tiun taskon, tamen kaŭzis la fakto, ke ne eblis rekruti personon el la GEJ-aktivularo. Pliajn ŝlosilajn poziciojn okupas homoj, kiuj same ne plu estas junuloj. Laŭ la jarraporto de la GEJ-estraro, aliaj postenoj estas simple vakaj.

Kio estas GEJ? La forfalo de la propra renkontiĝo devas esti finfina vekblovo, ke necesas trovi novan respondon al tiu demando.

La unua JES, la komuna aranĝo kun la poloj, okazos en Zakopane, la kutima AS-ejo. La pli alta risko do estas ĉe GEJ: Germanoj, kiuj ne ŝatas vojaĝi pli ol unu tagon al malproksima parto de Pollando, eble iros al konkurencaj aranĝoj en Germanujo aŭ restos entute hejme. Tiel malfacilas elekti novan estraron dum la JES, kiel oni decidis dum la jarĉefkunveno, nekonante la konkretan lokon jam.

La urĝa tasko por la GEJ-estraro konsistas el tio, akiri novajn aktivulojn. Alparoli kandidatojn antaŭe plej bone eblis dum la IS. Sub la novaj kondiĉoj tio ne faciligos. Sed ankoraŭ restas tempo por fari tion. Estus stulte, ne uzi la tutan jaron por tiu mamuta laboro.

Esperiga fakto estas: La Konstanta Komisiono pri Renkontiĝoj (KKRen), do la teamo, kiu organizis la Internacian Seminarion, konsistas el kapabluloj. Necesas atenti, ke ili same helpu ĉe la JES kaj ne lasu la laboron grandparte al la poloj. Homoj sen taskoj facile foriras kaj GEJ ne toleru, ke funkcia teamo simple malfondiĝu.

Krome estas saĝe, ne forjeti la nomon “Internacia Seminario”, sed uzi ĝin kiel subtitolon por la unua JES (same kiel “Ago-Semajno”). Kiu scias, kio okazos dum silvestro 2010/2011? La kontrakto inter PEJ kaj GEJ validas por unu jaro. Se poste oni volas iri denove apartajn vojojn, multe pli konvenas nerompita tradicio kun neniu jaro sen IS.

Simbola sceno montris, ke tiel facile la malnovo ne forgesiĝas: Dum la internacia vespero de la IS, la partoprenantoj kantis la 25-jaran IS-himnon – ne funebre, sed solene. **Gunnar Fischer**



IS: Festantaj homoj dum la silvestra balo. Foto: Katia Zaikina

Kiel fartas niaj novjaraj festivaloj?

Kune pasigi jarŝanĝan tutsemajnan E-aranĝon kun bunta programo, kaj en internacia medio adiaŭi la malnovan kaj bonvenigi la novan jaron dum silvestra balo, jen magneto kiu logas al partopreno ĉiam pli da esperantistoj.

Internacia Seminario

Biedenkopf estas trankvila urbeto en okcidenta Hesio, kie inter la 27-a de decembro 2008 kaj la 3-a de januaro 2009 okazis la 52-a Internacia Seminario (IS) de Germana Esperanto-Junularo.

Al la tradicia novjara renkontiĝo aliĝis preskaŭ 150 gejunuloj, precipe el pluraj landoj de Eŭropo, sed ankaŭ el Usono, Ĉinio, Peruo, Kanado, Argentino, Rusio kaj Aŭstralio.

La temo de la ĉi-jara IS estis „Katastrofoj”, sub kio oni povis ne nur facile kaŝi ĉiajn organizajn problemetojn, sed ankaŭ okazigi prelegojn pri propraj travivaĵoj pri la ĉina tertremo, pri vojaĝo al Ĉernobilo, pri la financa krizo aŭ pri fiaskintaj politikaj kaj filozofiaj teorioj. Sama etoso regis ankaŭ dum la silvestra balo, kiam validis esceptokaza regulo ke oni devas sin anonci se oni (ne) volas partopreni la konkurson pri la plej laŭ-tema aspekto.

La junulargastejo en Biedenkopf havigis bonajn kondiĉojn, malgraŭ sia situo en montara regiono kun taŭga nomo Hinterland (germane „Malantaŭ-lando”), pro kiu ĉi-jare ne povis okazi la tradicia naĝposttagmezo, ĉar la plej proksima naĝejo situis unu horon for per trajno. Fakte tuj apud la ejo troviĝis naĝejo, sed ĝi estis fermita dum la vintro. La pitoreska pejzaĝo tamen invitis al promenoj en la ĉirkaŭaĵo, inkluzive de la enkonduka urbopromeno, trezorserĉado „geokaŝado” kaj la „novjara migrado”. Kaj por tiuj, kiuj tamen preferis sidi ĉe komputilo, la ejo disponigis senpage senkablajn retkonekton,



En koridoro de la junulargastejo staris pluraj budoj, inkluzive de tiu de la TEJO-volontulo Federico Faccio Peláez.
Foto: Marek Blahuš

pro kio povis okazi ankaŭ aŭdvida internacia konferenco kun partoprenantoj de la samtagaj aranĝoj Ago-Semajno (AS) en Slovakio kaj Komuna Seminario (KS) en Japanio. Kaj tiu kiu post tiom da aktivaj deziris ripozi, povis profiti de la saŭno.

Ĉiujare pinto de la IS estas la silvestra nokto, kiam krom la balo okazas ankaŭ danckonkurso, sekvata de diskoteko en kiu oni kune celebras la novjaron laŭ la loka tempo. Pro la internacieco de la ĉeestantaro, pli etaj festoj tamen okazadis preskaŭ ĉiun plenan (kaj eĉ ne-plenan) horon. Tiel la unuan novan jaron oni festis je la 14-a posttagmezo (nova jaro en Aŭstralio), la lastan je la 8-a matene (nova jaro en Kanado).

Kaj por ankoraŭ plientuziasmigi la partoprenantojn dum la unuaj momentoj de la nova jaro, oni promesis por 00:30 specialan anoncon – „la plej gravan en la historio de la IS” – kiun samtempe en Liptovský Mikuláš komunikis al siaj partoprenantoj ankaŭ la organizantoj de la AS: Nome, sekvontjare okazos nek nek AS, sed la du aranĝoj okazos kune, sub la nomo Junulara E-Semajno - JES. Tiu informo, akompanata de filmeto kie la estroj de GEJ kaj PEJ prezentis la novan entreprenon, vekis grandan aplaŭdon de la ĉeestantoj, kiuj multaj devis dum la lastaj jaroj ĉiufoje malfacile decidadi, kiun el la du aranĝoj ili preferu kaj sekve kiun duonon de sia amikaro ili tiu-novjare ne povu renkonti.

Kunlabore de GEJ kaj PEJ, kune kun ĈEJ, okazos julie ankaŭ la 65-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Ĉeĥio, al kiu jam dum la IS eblis aliĝi kaj kiu estas la venonta granda junulara renkontiĝo okazonta antaŭ la nova jarŝanĝa aranĝo JES. **Marek Blahuš**



Je Silvestro okazis kiel kutime kostuma konkurso, ĉi-foje laŭ la temo „katastrofoj”. Ne malfacilis vestiĝi tiel. Foto: Gerard Sugranyes

Internacia Festivalo, sed ne nur...

Partoprenanto, kiu unuan fojon partoprenis la tradicion internacian festivalon diris al mi: „Ĉu estus troige diri, ke UK povus lerni el la IF?”

Tiuj, kiuj partoprenis jam multajn fojojn, ne tro surpriziĝas: ĉio fariĝas rutina, ĝenerale bone funkcias, kaj kritikemuloj serĉas ĝuste la etajn malagrablajn erojn en ĝenerale bone funkcia aranĝo. Spertoj de la organizanto kaj ties helpantoj kompreneble ludas grandan rolon. Dum iuj el la programeroj, kiuj traktis pri kongresoj, iu admiris la bonegan organizitecon de la aranĝo, kiu verŝajne ŝuldiĝas al tio, ke se sama homo prizorgas la aranĝon de renkontiĝo, tiu akiras valorajn spertojn, kiujn li povas reinvesti la postan jaron, des pli se ĉiam en la sama lando, foje en la sama ejo, dum por UK ĉiujare LKK devas reinventi diversajn paŝojn de la organizo, en malsama lando kun malsama kulturo kaj malsamaj cirkonstancoj. Ankaŭ la skalo estas tute alia: en IF kunvenis ĉ. 150 homoj, do povas esti multaj programeroj, kiujn ne eblas organizi por pli grandskala aranĝo, ekzemple ĉiuvespere komuna babilumado, muzikado, kantado, trinkado, en sama ejo. Granda avantaĝo estas ankaŭ, ke ĉio okazas en la sama loko: programo, manĝado, tranoktado...

La kadra temo estis literaturo, kaj tiel estis kelkaj prelegoj pri la temo, la relative malmultaj ĉeestantaj aŭtoroj prezentis siajn verkojn en aŭtora horo, sed tio ne estis la solaj seriozaj programeroj. Estis tiom riĉa programo, ĉiam okazis paralele 4 aŭ 5 programeroj, ke ofte malfacilis elekti, kion ĉeesti: mi persone bedaŭris iujn koincidojn. Ĉu ĉeesti prelegon de Ulrich Lins pri ‘TEJO en 1968’ aŭ aŭskulti Renaton Corsetti paroli pri ‘Homoj kaj membroj en la movado’? Nesolvebla dilemo. Kaj pri juda humuro Josef Šemer certe ridigos la ĉeestantojn. Feliĉe la kvaran proponon mi rajtas flankenmeti, ĉar ĝi rilatas al alia speco de publiko, al kiu mi delonge ne plu apartenas: temas pri ekzerca rondo por ne tiom lertaj parolantoj, gvidata de Tatjana Loskutova. Tio estis la unua mateno. Posttagmeze denove 4 paralelaj programoj, kaj aldone eblo ekskursi al la malnova parto de la urbo Düsseldorf... Ni ne havas tempon enui. Post la kafpaŭzo, denove 4 paralelaj programeroj; i.a. komenciĝas la unua sesio de IVU (vidu la noton de Amri Wandel), kun prelego de Renato Corsetti, ne maltrafebla: lingvistikaj observoj pri kelkaj trajtoj de Esperanto. Inter la 25 IF kiujn mi ĉeestis, tiu ŝajnas al mi esti la plej serioza. Ne nur pro la fakaj prelegoj, ne nur pro IVU sed ankaŭ pro la okazigo de la tutunaj novtipaj ekzamenoj. Mi mem miris, ke eblis okazigi tiun sesion. Mallonge antaŭe venis la propono okazigi ilin en IF, kaj mi supozis, ke neniu emus fari ekzamenojn en tiu festivala jarfina etoso. Feliĉe mi malpravis: estis granda interesiĝo, se konsideri la lastminutecon: la ekzamenojn oni anoncis nur dum la IF mem (vidu la prian gazetaran komunikon). Tiuj aferoj donis sian karakteron al la Jubilea IF: inter la diversaj jarŝanĝaj aranĝoj, ĝi verŝajne estis la sola, kie okazis tiaj seriozaj eroj.

Eblis frandi Piron, kaj kisi ranon, joge ekzeraci, lerni linian dancon, informiĝi pri kupado (kun praktikaj ekzercoj),

origamii, paki per japana tuko aŭ navigi en la virtuala mondo de Dua Vivo. Estis Iano ĉe la piano. Magiisto kaj pupteatristo Triksini malkaŝis la sekretojn de sia arto per seminarietoj. Per bildaj prezentoj oni vojaĝis tra Japanio, Argentino, Venezuelo, Rusio, Armenio, Nepalo aŭ la Norda Vjetnamio.

Kaj la kutimaĵoj en tiu sezono: silvestra bufedo (kiu tamen havis nenion festecan) kaj silvestra balo, kun sinsekva festado de la novaj jaroj, laŭ la horzonoj de la partoprenantoj; ĉampanjo, kisado kaj grandioza etoso.

Kiel kutime funkciis libroservo, kie feliĉe alvenis en la antaŭlasta vespero, rekte alportita el presejo, la nova libro de la ĉeestanta verkistino Anna Löwenstein *Morto de Artisto*, kiu tiel povis prezenti ĝin al la publiko en sia aŭtora horo.

La ekskurso celis viziton al 3 landoj, Germanio, Belgio, Nederlando. Unue ni rapide vizitetis la centron de Aachen, tra malnovaj stratoj kaj placoj, kaj ni rigardis la mirindan katedralon. Sed eble plej memorinda estis la vizito al bakejo, kie oni preparas la akenajn spickukojn “*Printen*” (kaj ni rajtis gustumi tiujn “*presajojn*”). Poste, ek al Kelmis, en Belgio. Moresnet, kie situas Kelmis, havas tre specialan historion, kiun prezentis la tie akceptanta esperantisto Mathieu Schrymecker. Unue Moresnet estis ‘neŭtrala ŝtato’ inter 1815 kaj 1919, pro malakordo inter Prusio kaj Nederlando. Kaj en aŭgusto 1908, do antaŭ 100 jaroj, fondiĝis la Esperanto-ŝtato ‘Amikejo’.

Nin atendis la televido, kaj rezultis diversaj intervjuoj. La abundega manĝo daŭris tiom longe, ke fine jam noktis, kiam ni atingis la trilandan punkton, kaj pri pluaj vizitoj de nederlandaĵoj ni devis rezigni.

Multe da muziko, ne nur dum la vesperoj. Mikaelo Bronŝtejn, aŭtoro kaj bardo el Rusio, reĝisoris la interkonan vesperon kaj partoprenigis la ĉeestantojn en diversaj ludoj. Tre ŝatataj estis “La danĝera ul’”, koncerto de Ĵak Le Puil, kun kantoj el 30-jara repertuaro, kaj la koncerto de Alejandro Cossavella, multfaceta artisto el suda Argentino. Alejandro cetere ne nur turneis tra



Latva kaj litova novjaroj.
Foto: Claude Nourmont

kelkaj eŭropaj landoj dum la pasintaj monatoj, sed li sukcesis turnei tra la tri germanaj jarfinaj aranĝoj. La lasta vesperarango estis kiel kutime prezentado de muzikaj, dancaj aŭ skeĉaj kontribuoj de diversaj partoprenantoj.

Sed la plej granda etoso estis ĉiam post la oficiala programo, en la „knajpo“ – fakte la knajpo estas ankaŭ iasence oficiala parto de la programo, ĉar tie ĉiuj retroviĝas, trinkas, babilas, iuj muzikas, ĝis malfrua horo. Gratulindaj prizorgantoj (ĉefe prizorgantinoj), kiuj fermas la butikon nur kiam ne plu estas kliento... Sen knajpo IF ne estus IF!

Tiu ĉi IF estis la 25-a, kaj do necesis festi la Jubileon. Oni tion faris per speciala vespero, kie la magiisto elmagiis la 13 ĉeestantajn partoprenintojn de la unua IF, okazinta en la jarŝanĝo 1979/1980.

Sekvis anekdotoj el tiu unua IF (kiu tiam estis samloke kiel IS), kelkaj surprizaj lumbildoj, muzikaj kaj aliaj kontribuoj honore al la pioniroj de IF, kaj fine la magiisto aŭguris pri la estonto de IF. La vespero glorie finiĝis per trinkado de ŝaŭmvino kaj frandado de memorindaj kukegoj speciale menditaj por la okazo.

La nunaj partoprenantoj estas fakte pli-malpli la sama generacio kiu antaŭ 29 jaroj transiris de IS al IF, kiuj daŭre ŝatas la ecojn de la programo, la etoson, kaj ĉefe la eblon retrovi la geamikojn de jaro al jaro. Ĉi-jare la IF funkciis kiel aparte altnivela klerigejo, kio ne malhelpis ĝui la kutiman distran etoson. Inda Jubileo! Dankegon al la ĉefa motoro HDP (Hans-Dieter Platz), kiu sukcesas tra la jaroj stiri la aranĝon kaj feliĉigi postulemajn partoprenantojn.

Claude Nourmont

IVU dum IF

La 2-a Internacia Vintra Universitato: refoje dum la IF, denove en Düsseldorf.

La plej nova alveninto al la listo de Esperantaj universitataj kursoj estas la Internacia Vintra Universitato (IVU), kiu unuafoje okazis kadre de la pasintjara Internacia Festivalo en Düsseldorf, kaj ĉi-jarfine la duan fojon, samloke, samkadre. Ĝis la jaro 1980 la universitataj lekcioj dum la UK nomiĝis Internacia Somera Universitato (la nomo estis ŝanĝita al "Internacia Kongresa Universitato" okaze de la unua sudhemisfera UK en Brazilo). Kial do ne estu ankaŭ vintra universitato?

Sekve de la sukceso de la unua sesio de IVU (fakte AIS-sesio okazis dum IF ankaŭ antaŭe, en 2005, sed kiel paralela aparta programo de Akademio Internacia de la Sciencoj, AIS), okazis la lasta IVU, denove en formato simila al la „komuna sesio“ de AIS kaj IKU dum UK: studadsesio de AIS konsistanta el tri AIS-kursoj. La elekto de temoj estis tre varia: Renato Corsetti prelegis pri "Lingvistikaj observoj pri E-o", Eugen Macko pri "Naciaj ideologioj en Mezeŭropo", kaj Amri Wandel, kiu ankaŭ rektoris, pri



Maja Loskutova provas la teleskopon kunmetitan de la IVU-kursanoj. Fotoj: la aŭtoro.



Kelkaj el la finintoj de la IVU-kurso pri teleskopoj kun siaj AIS-atestoj kaj la profesoro.

la temo „Teleskopoj“, okaze de la 400-jara datreveno de la invento de la astronomia teleskopo. (Resumoj de la tri kursoj videblas ĉe www.internacia-festivalo.de/ sub „Internacia Vintra Universitato“.)

La kurso pri teleskopoj inkludis ankaŭ praktikan parton, en kiu la partoprenantoj kunmetis veran teleskopon, kaj sekve uzis ĝin (dum la silvestra balo) por observi stelojn, malgraŭ la subnulaĵaj temperaturoj ekstere.

Fine de la kurso okazis ekzameno por la interesitaj partoprenantoj. Sukcesis 13, kiuj ricevis atestojn de AIS en publika ceremonio kadre de la vespera programo. Koincide, la organizantoj de tiu ĉi Armena Vespere, Elena kaj Jasmin Arakeljan, havas la saman nomon kiel la fama armena astronomo, je kies nomo nomiĝas pluraj galaksioj.

Amri Wandel

Novjara Rekontiĝo

Familie kaj mezaĝule

Kun 62 infanoj kaj junuloj ĝis-20-jaraj la 7-a Novjara Renkontiĝo de EsperantoLand ankaŭ ĉi-foje estis unu el la plej grandaj familiaj Esperanto-renkontiĝoj. Ĉirkaŭ la duono de la infanoj hejme parolas Esperanton, kio bone subtenis la lingvouzadon inter la infanaro. Entute kunvenis en Frankfurto ĉe Majno 143 homoj, tri kvaronoj el eksterlando, el entute 15 landoj: el Kanado, siberia Rusio kaj el dekduo da eŭropaj landoj. El Argentino venis Alejandro Cossavella, kiu bele koncertis ĉe ni kadre de sia eŭropa turneo. Denove kreiĝis la amikeca etoso de Esperantolando, kiun la partoprenantoj tre ŝatis.

En la vespera programo Christoph Frank brile prezentis persone kaj per pupoj teatraĵon pri la aventuroj de Münchhausen, la heroo de bele fantaziaj rakontoj. Estis luda, muzika kaj internacia vespero kaj kompreneble silvestra festo, dum kiu eblis spekti la pireteknikaĵojn de Frankfurto el taŭge lokita salono en la 5-a etaĝo.

Ampleksa infana programo

La infana programo kadre de la temo „la kvar elementoj“ enhavis kreadon de kajtoj, raketveturiloj, paraŝutoj, fajropilkaj, kandelaj kaj terornamaĵoj; la junuloj lernis kiel solvi la magian Rubik-kubon kaj spertis surprizan akvoarton kaj eksperimentojn pri akvo, aero kaj fajro; estis infana danckurso kaj oni povis lerni akrobatikon. Oni aŭdis „piĝamajn rakontojn“ kaj rimajojn, kantis komune, ŝminkis unu la alian kaj kreis improvizan muzikan teatraĵon. Grupo de junuloj kreis filmojn pri la aranĝo kaj prezentis daŭran diskotekon al dancemuloj. Okazis luda posttagmezo, dum kiu oni en la unuopaj stacioj solvis diversajn taskojn. Fakte estis plena programo por infanoj kaj junuloj de mateno ĝis vespero kaj malfacilis enui.

„Esperanto en entreprenoj“ kaj aliaj prelegoj

La prelegoj temis pri la financa krizo kaj pri gestolingvo, pri Su-Dghok-terapio, Marso, la kvar elementoj en la kosmo, Vikipedio, EDE, Esperanto en entreprenoj, Argentino kaj pri Herzberg; estis diskutoj pri „Kio estas esperantisto“, pri perspektivoj por Esperanto kaj pri la Civito. La partoprenantoj povis senstreĉiĝi per gimnastiko, vizaĝmasaĝo aŭ per Yumeiho, aŭ ili povis lerni kiel trike (kaj truke) krei bestetojn aŭ hokile triki.



Infanoj studas.
Foto: la aŭtoro.

Lingvokursoj kaj babilado

Ankaŭ ĉi-foje estis kursoj por komencantoj, progresantoj kaj konversaciemuloj, kiujn gvidis Katalin Kováts, Sylvain Lelarge kaj Gunter Neue. La ekskursoj kaj promenoj gvidis nin tra Frankfurto, al muzeo pri la „hirthara Petro“ kaj al Darmstadt. Plej grave – malgraŭ ĉiuj unuopaj programeroj – supozeble ankaŭ ĉi-jare estis la amika babilado, kiu okazis grandparte en nia trinkejo, kiun sperte gvidis Helmut Klünder. La infanoj dume havis sian propran regnon en alia parto de la domo.

Gazetaj raportoj en Germanio, Hispanio kaj Ameriko

La gazetaraj komunikoj atentigis pri la tri samtempaj Esperanto-aranĝoj en Germanio kaj ties impona kresko dum la pasintaj jardekoj; rezulte raportis germana kaj hispana novajagentejoj, tri radioprogramoj kaj almenaŭ deko da gazetoj kaj retgazetoj el Germanio, Hispanio, Usono, Meksiko kaj Argentino.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand



Polonezo.

Ĉu la lasta Ago-Semajno?

Verŝajne JES!

La freŝa jarŝanĝa junulara aranĝo Ago-Semajno (AS) estis el pluraj vidpunktoj eksterordinara: Unuafoje ĝi okazis ekster Pollando, en Slovakio. Unuafoje ĝi daŭris ne 6, sed 8 tagojn. Unuafoje venis partoprenantoj de 25 landoj. Okazis plej multe da koncertoj dum ĝi kaj... – ĝi verŝajne estis la lasta Ago-Semajno.

La Ago-Semajno inter 27 dec 2008 kaj 04 jan 2009 allogis al la slovakaj urbo Liptovský Mikuláš pli ol 180 personojn de 25 landoj. Kunorganizis ĝin 4 organizoj: Pola Esperanto-Junularo (PEJ), Varsovia Vento, Slovaka Esperanta Junularo (SKEJ) kaj Liptova Esperanto-Klubo (LEK). Pri pluraj programeroj signife helpis ankaŭ la urbo Liptovský Mikuláš.

Grava kaj ĝojiga estis la fakto, ke ĉi-foje transprenis la aŭspicion pri AS eĉ vicĉefministro de Slovakio Dušan Čaplovič. Krom li la aranĝon aŭspiciis la urbestro de Liptovský Mikuláš Ján Blcháč, distriktestro de Žilina Juraj Blanár kaj esperantistino Małgorzata Handzlik – pola membro de la Eŭropa Parlamento.

Pro la fakto, ke la aranĝo estis 8-taga, eblis riĉigi la programon kaj plenigi ĝin per distraj programeroj. Aldone enkadre de AS okazis la jam tradicia, 27-jara slovakaj aranĝo, renkontiĝo de esperantistaj turistoj kaj vojaĝantoj “Poludnica”. Krom tio unuafoje aperis la ĉeftemo de la aranĝo “Lingvoj – pordo al interkulturo”. Harmonie kun tiu frapfrazo okazis pluraj programeroj.

Por la alvenintoj estis preparita vere riĉa kaj bunta programo, de kiu ni citu almenaŭ parton:

Lingvo-kursoj: Esperanto por komencantoj fare de Stano Marček; kurso de la slovakaj fare de la prezidantino de SKEJ Katarína Nosková, kies freŝan verkon *Slovaka konversacio skize*

trovis ĉiuj alvenintoj en siaj kongresaj sakoj; kursoj de la pola, ukraina, franca kaj signolingvo.

Prelegoj: pri E@I, Granda Moravio, ekologio, kuracaj herboj, revuo *Esperanto*, neŭrolingvistiko...

Ekskursoj: urba ludo, tuttaga al la montaro Tatroj, al Poludnica; duontagaj al Žiarska dolina (Ĵarska valo), subĉiela muzeo en Pribylina kaj hotelo Esperanto, al akvo-parko Tatrallandia.

Koncertoj: Pafklik, Georgo Handzlik, Dolchamar, La Perdita Generacio, popolgrupo Váh, JoMo.

KLF: Kultura kaj Lingva Festivalo – jam tradicia okazaĵo dum AS, okazinta en la kulturdomo de Liptovský Mikuláš.

Ceteraĵoj: Novjara balo, Teatra horo, Mezepokaj dancoj, danco-kurso, sindefenda kurso, seminarieto “Flugiloj”...

Certe grava kaj interesa por la ĉeestantoj estis la sciigo de la organizantoj, tuj dum la unua horo de la jaro 2009 – ke venontjare NE plu okazos AS, sed efektive same ne okazos IS – du similcelaj vintraj E-aranĝoj. Anstataŭ ili du okazos unu komuna aranĝo en Zakopane – preparata de ambaŭ organizaj teamoj (pola kaj germana kune) sub la nomo JES = Junulara E-Semajno. Estos certe ĝojige por esperantistoj, kiuj dum la lastaj jaroj devis elektadi, kien iri, ĉar en ambaŭ aranĝoj troviĝis parto de iliaj geamikoj. La nova aranĝo krome ebligis pli buntan kaj pli riĉan kulturen programon (pro pli granda buĝeto) kaj pli da samtempaj programeroj (por ke ĉiu trovu por si ion).

Restas nur konstati, ke AS ankaŭ ĉi-foje estis sukcesa, bonetosa aranĝo, per kiu preskaŭ ducento da esperantistoj adiaŭis la malnovan kaj bonvenigis la novan jaron 2009.

Por tiuj, kiuj volus reveni al Slovakio en pli varma periodo dum la jaro 2009, ni informu, ke julie (10-18) okazos en la urbeto Modra apud Bratislava plua “Somera Esperanto-Studado” (SES), kun la dua lernu!-renkontiĝo. Do ankaŭ la eblo renkontiĝi internacie kaj bonetose en “la malgranda granda lando”, kiel oni ofte nomas Slovakion. Kaj por tiuj kiuj jam planas sian vintran feriadon: ĝis la revido en Zakopane, dum JES 2009. Pliaj detaloj pri AS troveblas ĉe www.as.pej.pl; video-kaj fotogalerio ĉe www.lek.szm.sk.

Peter Baláž



Partoprenantoj de Ago-Semajno en Slovakio. Foto: Vladimír Škuta.

Transjara martelado en Japanio

Je la fino de 2008 mi havis okazon marteli.

Ŝtalon? Ne, ... rizon. Post kuirado oni frapegas ĝin per ligna martelo, ĝis ĝi atingas koherecon de knedaĵo taŭga por fari novjarajn kukojn.

Ankaŭ la intensan instruadon de Esperanto en la japana urbo Kameoka oni rajtas nomi martelado. Temas pri la tradicia „Transjara Kurskunveno” en la centro de Oomoto. Ekde la 30-a de decembro 2008 ĝis la 2-a de januaro 2009 oni instruis/lernis ĉiutage po 6 horojn. Krome okazis, ankaŭ ĉiutage, tiel nomata „Kleriga Kurso”, kiun konsistigis prelegoj. Al ĉio ĉi aldoniĝas diversaj kunvenoj, ceremonioj kaj malfruhoraj babiladoj en la salono nomata „Paradizo”. Vere ne estas mito la japana laboremo. Ankaŭ tiu de la koreoj, kiuj alvenis dekoje. Cetere ĉeestis unu malajziano, kvazaŭ intence, por kompletigi la liston de partoprenantoj ĝis la ronda nombro 100. Ja 10 estas konsiderata de Oomoto simbolo de idealo kaj videbliĝas en ĝia blazono.

La tuta cento estis dividita en sep diversgradajn klasojn. Konversaciojn gvidis la svisino Mireille Grosjean kaj la japano Hiromi Jano. La elementajn kaj mezgradajn klasojn prizorgis Masaniĉi Tanaka, Hirotomi Hazama kaj Katsuja Kimura, dum kun la komencanta grupo „Cseh-metodumis” Atilio Orellana, argentinano el Nederlando. Kiel rondiraj helpantoj funkciis la koreo Lee Jung-kee kaj la subskribinto de tiu ĉi raporto. Plej multe mi kunlaboris kun Saitoo Hitoŝi, kiu klarigis gramatikajn sekretojn al siaj grupanoj, dum mi paroligis ilin helpe de „Mazi en Gondolando”.

Oomoto akceptis Esperanton kiel sian duan lingvon jam en la jaro 1923. Ĝia administra centro en Kameoka impresas gastojn per „samideana” etoso. En ĝia vasta tereno



Gajaj lernantinoj Jasuko Shimomukai, Kijoko Hara kaj Toshi Hara.

okulfrapas dulingvaj, japanaj-Esperantaj, ŝildoj. Esperantisto ne perdiĝas en la labirinto de ĝiaj longaj koridoroj. Danke al Esperantaj indikiloj ĵus mi malkovris vojon al la tradicia komuna banejo. Ankaŭ la instrukcio pri banado estas legebla en la lingvo internacia. Necesas ja scii i.a.: *Oni kutimas ne enporti bantukon en banejon*. Vere, Esperanto estas klara lingvo ne nur en telegrafo.

Internacilingva kerno en Oomoto estas Esperanta Populariga Asocio, kies 10 oficistoj, estrataj de Masaniĉi Tanaka, ĉiuj parolas Esperanton. Pliaj ses esperantistoj laboras en aliaj fakoj. Altkvalita esperantisto, Ŝigeki Maeda, estas ĉefo de la Oomoto-filio en Brazilo, kaj Takaŝi Agou ĵus forveturis helpi la organizadon de tiu kultura-religia movado en Mongolio. Esperanton regas eminentuloj de Oomoto, nome ĝia longjara direktoro Kiotaro Deguĉi kaj Spirita Gvidantino, Kurenai Deguĉi. Ŝi renkontiĝis kun la partoprenantoj de la Transjara Kurso kaj salutis ilin en perfekta Esperanto. La Novan Jaron 2009 s-ino Kurenai Deguĉi bonvenigis en la ĉefa templo de Oomoto en Ajabe, sed de tie ŝi televide transdonis bondezirojn al Kameoka, komencante kaj finante sian mesaĝon en la lingvo internacia.

Sed kiel finiĝis la jaro 2008 por la partoprenantoj de la Transjara Kurso? Ili ĝuis la emociplenan teceremonion, kies gravan elementon konsistigis gustumado de kukoj, la kukoj el rizo, kiun mi ne vane martelis.

Roman Dobrzyński



La rondira helpanto Lee Jung-kee.



Dum la lernado regis ĝojo. Fotoj: Arkivo de Oomoto.

Zamenhof-jaro 2009:

Neŭtrala lingvo kaj nova humanisma etiko

– la celado de d-ro L.L. Zamenhof



En tiu ĉi jaro ni planas en nia revuo serion de artikoloj pri diversaj aspektoj de la vivo kaj agado de L.L. Zamenhof, kiuj estos verkitaj de kompetentaj aŭtoroj el pluraj landoj.

Esperanto, homaranismo kaj cionismo nomiĝas la tri premisoj, sur kiuj baziĝis la tuta pensado, verkado kaj laborado de d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917). Eblas kronologie inversigi la vicon de tiuj tri pilieroj laŭ disponebla prioritato ĉe Zamenhof, kiu alterne okupiĝis pri ili, foje pli intense, foje malpli. Certe oni povus ankaŭ uzi sinonimojn: Esperanto estas la vivanta simbolo de la internacia neŭtrala planlingvo, la homaranismo esprimas novtipan humanisman etikon en la mondo, la cionismo klopodis solvi la problemojn de unuopa etno, do de la hebreaŭ judoj, al kiuj Zamenhof apartenis. Ĉe L.L. Zamenhof ĉiuj tri temoj estis intime kaj nedisigeble interligitaj. Ekskludi unu el ili, ekzemple la judan fonon de Zamenhof, do simple ne eblas, ĉu tio plaĉas aŭ ne. Nature, la Esperanto-movado elektis kaj popularigis nur la ideon de la neŭtrala lingvo, ĉar ĝi konsideras sin movado ne religieca, sed internacilingva (aŭ planlingva), dum la homaranismo kiel dubinda doktrino, ĉar konsiderata kiel tro utopia, estis maksimume efektivebla kiel ‘interna ideo’ de la ‘esperantismo’ kun la kerna signifo de solidareco kaj amikeco inter la popoloj. Pri la cionismo Zamenhof rezignis, kaj li lasis al aliaj la taskon efektiviĝi ĝin. En la Esperanto-propagando la juda deveno de Zamenhof estis longe prisilentata, eĉ en la *Enciklopedio de Esperanto* (1934). Ĉi tiun neceson evidente diktis la cirkonstancoj de konkreta historia periodo. Ĉar en la vivotempo de Zamenhof – kaj ankaŭ poste – la antisemitismo estis integra elemento de politikaj reĝimoj de diversaj ŝtatoj, de Francio kaj Germanio ĝis Pollando kaj Ruslando. Preskaŭ neniu nuntempa esperantisto, krom se li aŭ ŝi estas informita, konscias, ke Zamenhof origine celis krei neŭtralan lingvon ekskluzive por sia propra gento vivanta en la diasporo, aŭ ke la lingvo Esperanto estis nur parto de la ‘granda ideo’ de la projekto, kiun Zamenhof nomis homaranismo (pli frue hilelismo), kiu siaflanke sen la juda sav-ideo ankaŭ ne estas pensebla.¹ Feliĉe, kelkaj esperantologoj denove dediĉas atenton al tiu grava temo.² Kaj anstataŭ prihonti

aŭ kaŝi la judecon de Zamenhof, ni povas hodiaŭ fieri pri tiu heredaĵo, sendepende de tio, ĉu ni estas kristanoj, ateistoj, sennaciuloj, aŭ io alia, aŭ judoj mem.

Zamenhof ne estis polo

Iom post iom, kaj certe fine de sia vivo, Zamenhof ‘abdikis’ ĉian politikan ŝovinismon kaj gentan patriotismon (li eĉ ne plu volis aliĝi al la hebrea Esperanto-asocio) por deklari kaj proklami sin mem kiel ‘homaranon’, havante la deziron esti nur ‘homo’.

Lige kun la ĝis nun emfazita ankoraŭ unu mito, kiu obstine kaj persiste konserviĝas erare kiel vero en la konscio de parto de la esperantistaro, eĉ klera kaj informita, kaj devas esti traktita – kaj rifuzita. Zamenhof *ne* estis polo! Same kiel li ne estis ruso aŭ litovo aŭ israelano aŭ kio ajn ankoraŭ. Laŭ la fontoj, kiujn ni posedas, Zamenhof nomis sin, laŭ ŝtata aparteneco, “ruslanda hebrea” aŭ judo (ruslingve: *ruskij evrej*), kaj “Litovujon” li konsideris kiel sian patrujon, hejmlandon, do ne Pollandon, al kiu li migris. Kiam Zamenhof vivis en Varsovio, certe la pola lingvo ricevis pli fortan signifon en lia ĉiutago, kiel li skribis al siaj korespondantoj, sed tiu lingvo estis de li uzata nur inter aliaj, ĉar la originaj etnolingvoj por li estis kaj restis la rusa kaj la jida. Polan identecon li decide rifuzis en siaj leteroj, kaj fakte nenie en la verkaro de Zamenhof estas trovebla emfazo pri lia eventuala poleco. Krom lia kono de la pola lingvo kaj ke li loĝis en Varsovio, Zamenhof havis do nenion komunan kun la poleco. Do lia laŭdira poleco estas speco de invento, kiun oni poste altrudis al li interalie por kaŝi lian judecon³. Paradoksoj en la identeco de orienteŭropaj homoj estas normala afero. Estus do bone, se la esperantistoj revizius sian tradicie falsan bildon pri la ‘polo’ Zamenhof. Samtempe necesas konsideri, ke Zamenhof ankaŭ ne estis filologo (nu, iusence eble nur hobia).⁴

Blankaj makuloj en la biografio de Zamenhof

Efektive, la kompreno de la ideologio de Zamenhof prezentas al ni kelkajn problemojn, ĉar ĝi ne estas libera de nebulaj momentoj kaj internaj kontraŭdiroj. Ankaŭ en la biografio mem de Zamenhof troviĝas multaj epizodoj, kiuj ĝis hodiaŭ ne estas klarigitaj – ekzemple kiujn gravajn verkojn Zamenhof konis, kion Ludoviko vere travivis en Bjalistoko, kion li efektive faris

1) La hilelismo de 1901 devas esti diferencigita de la hilelismo de 1906, ĉar temas pri komplete diversaj konceptoj kaj enhavo.

2) Kompreneble, CED/UEA, ESF kaj GIL kaj aliaj organizoj kaj individuoj jam faris multon ĉi-rilate. Ekzemple Korjenkov (kiu eldonis la libron *Mi estas homo*), Künzli kaj *Želazny planas la verkadon kaj aperigon de sciencaj Zamenhof-studoj* (biografioj); Lins prilaboris la 6-an eldonon de *Vivo de Zamenhof de E. Privat kaj publikigis germanlingvan artikolon pri la cionismo kaj homaranismo de LLZ en la Juda Almanako de la Leo-Baeck-Instituto*, kaj Kiselman verkis publikigotan artikolon pri la evoluo de la homaranisma ideo ĉe LLZ, kiu dume atingeblas en interreto.

3) En publikigota studo *Árpád Rátkai esploris preskaŭ cent diversajn nacilingvajn enciklopediojn rilate la indikon pri deveno kaj identeco de Zamenhof*.

4) Kiel tion asertas diversaj nacilingvaj versioj de Vikipedio.

en Moskvo krom la studado kaj kial li anticipe forlasis ĝin, kio vere okazis lige kun la bruligo de lia lingvomanuskripto, ĉu la Zamenhofoj vere manĝis ŝinkon, ĉu Zamenhof estis bona okulkuracisto aŭ ne, kiun veran rolon ludis liaj gepatroj, la bopatro Zilbernik kaj liaj aliaj parencoj, kiu estis la geografia origino de la Zamenhofoj kaj kiel korekte interpreti la etimologion de lia nomo, kiujn literaturajn modelojn Zamenhof uzis por siaj beletraj tradukoj, ktp. Pri amaseto da eroj de liaj vivo kaj laborado ni estas daŭre malbone informitaj, kaj ni emas kredi la mitojn kaj legendojn, kiujn surtabligis al ni diversaj biografoj – de Privat ĝis Centassi/Masson (sendepende de la nobleco de ilia biografia laboro). La tasko de la esperantologoj kaj ‘zamenhofologoj’ estus provi ekscii iom pli, ion novan rilate al ĉiuj tiuj demandoj.

Riĉa heredaĵo esplorinda

Kiel oni povas imagi, la zamenhofa idea heredaĵo estas riĉa kaj multfaceta kaj donas multajn okazojn por scienca esplorado. La analizado de la fenomenoj laŭ sektemaj manieroj ‘finvenkisma’ aŭ ‘raŭmisma’ jam estis farata kaj ne plu taŭgas. Ni ne plu praktiku fantazilogion kaj metafizikon diverstipajn, sed apliku novan realismon, laŭ modernaj sciencaj normoj kaj kriterioj. La fakuloj de la lingvistiko, socilingvistiko, lingvosociologio, lingvofilozofio, historiografio, politikologio, etnografio, teologio, hebreistiko/judistiko kaj de aliaj fakoj kiel kibernetiko, hermeneŭtiko kaj kompreneble interlingvistiko estas alparolataj.

Sed ekzistas ankoraŭ aliaj dimensioj en la zamenhofa filozofio, kiuj indas je konsiderado. Mi pensas unuavice pri liaj diversaj rimarkindaj traktaĵoj kiel *Esperanto kaj Volapük* (1889/90), *Esenco kaj estonteco* (1900), *Gentoj kaj Lingvo Internacia* (1911), *Post la Granda Milito* (1915), kie lingvoetikaj, lingvofilozofiaj, lingvoteoriaj kaj lingvopolitikaj aspektoj ludas pli gravan rolon. Ĉi tiujn tekstojn necesus nove legi, nove analizi kaj nove priskribi laŭ moderna lingvaĵo por povi taksu ilian signifon kaj por la tiama epoko kaj eble ankaŭ por la nuntempo.

Ne plej laste en la vico de la zamenhofa verkaro elstaras la grandiozaj paroladoj, kiujn li prezentis okaze de la Universalaj Kongresoj de Esperanto, precipe en Bulonjo, Ĝenevo, Kembriĝo/Londono, Vaŝingtono. Ĉi tiuj tekstoj ne nur signifas konsiderindajn ekzemplojn de kulmina retoriko en Esperanto, sed ili entenas praktike ĉion ideo esencan, kion Zamenhof volis mesaĝi. Certe, tiuj paroladoj entenas multajn kuriozaĵojn kaj respegulas unuavice la personajn vidpunktojn de Zamenhof, ligitajn kun la homaranisma projekto kaj kun kelkaj aktualaj okazaĵoj. Ĉu dum tiuj paroladoj Zamenhof estus povinta aŭ devinta elekti aliajn pli adekvatajn temojn? Oni almenaŭ rajtas starigi tiun demandon. Kiel sciate, al Zamenhof oni malpermesis diri publike pri interfratiĝo inter diversaj religioj kaj pri homaranismo, tiel ke tiuj neeldiritaj partoj kaptas la atenton de la historiistoj ĝis nun.

Bona faka kono estas postulata

La traktaĵoj kaj *Leteroj de Zamenhof*, zorge kolektitaj kaj eldonitaj de Dietterle, Waringhien, Holzhaus kaj Itō (ludovikito) kaj laste de Korĵenkov, kiu kompilis kaj prinotis la homaranismajn dokumentojn en tema kaj kronologia kunteksto,

disponigas senliman rezervujon de informoj el la zamenhofa tempo. En la leteroj de Zamenhof ofte aperas banalaĵoj, tiel ke eblas bedaŭri, ke Zamenhof ne rakontis pli profunde pri si mem, pri sia ĉiutaga vivo, kion li legis, faris, diris, aŭdis, pensis kaj vidis, kiu vizitis lin kaj kun kiu li parolis pri kio (nu, multegaj leteroj de Zamenhof perdiĝis, kaj ni ne scias, kion li skribis en aliaj leteroj). Por la kompreno de lia ekzistado tiaj informoj estus ege utila provizo. Restas al ni do iel rekrei, restaŭri tiun zamenhofan periodon, kio lasas al ni sufiĉe multe da libera spaco por la interpretado kaj imagado. Klaras, ke por rekonstrui la tiaman realecon necesas bonega faka kono de la kutimoj, moroj, trajtoj, etoso kaj problemoj de la tiama tempo.

Komprenoble oni povas kaj devas daŭre okupiĝadi pri lingvistikaj kaj literatursciencaj demandoj lige kun la verkaro de Zamenhof, kvankam multo estas jam farita.

Deziroj en la jubilea jaro

Inaŭgure al la nuna jubilea Zamenhof-jaro mi ŝatus esprimi kelkajn dezirojn: La unua koncernas la malnovan (kaj intertempe maljuniĝintan) generacion de esperantologoj, kiu fervore aktivadis en la 1970/80-aj jaroj kadre de unikaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj simpozioj en diversaj landoj, por ke ili retrovu la kuraĝon kaj pluokupiĝu pri esperantologio kaj zamenhofologio.

La dua deziro direktiĝas al novaj publikoj en kaj ekster la Esperanto-movado kun la espero, ke interesataj kaj kapablaj novaj fortoj aliĝu al la laboro cele al la faka esplorado kaj sistema analizado, hermeneŭtika interpretado kaj scienca eldonado de la zamenhofa verkaro por atingi novajn ekkonojn, rezultojn kaj sukcesojn sur tiu ĉi specifa kampo. Sinergie kaj sinteze al ĉiuj tiuj sciencaj kaj popularsciencaj klopodoj necesus entrepreni ĉefan projekton: la verkadon de moderna, ampleksa kaj se eble kompleta bio/bibliografio pri la kreinto de Esperanto kaj de la homaranismo. La historion de la internacia lingvo Esperanto ni ne vidu sen la homaranisma kunteksto, kaj interpretu la zamenhofan postlasaĵon se eble en la kunteksto de lia vivotempo kaj laŭ pli aktualaj kriterioj, ĉar fake necesas adapti sin al la nuntempa realo.

Tre utila, kaj fakte necesa projekto estus la ciferecigo de la kompleta zamenhofa verkaro, por pli facile trovi la aferojn per aŭtomata serĉado, eventuale ankaŭ ĝia interretigo, ĉar labori nur surbaze de libroj, parte elĉerpitaj, estas malpraktike, tempoperde kaj multekoste.

Mi estas en la bona kredo, ke konstrui la ponton inter la zamenhofa pensado kaj la moderna tempo eblas, kiel montras la sperto kun la okupiĝado pri homaj kaj lingvaj rajtoj, lingvopolitiko, interlingvistiko k.s.

Andreas Künzli

Ĉefaj konsultindaj libroj pri la temo (elekto):

Vivo de Zamenhof. Edmond Privat. Red. Ulrich Lins. Rotterdam 2007 (6-a eld.).

Mi estas homo. L.-L. Zamenhof. Red. Aleksander Korĵenkov. Kaliningrad 2006.

Familio Zamenhof, La. Zofia Banet-Fornalowa. La Chaux-de-Fonds 2001.

Paroladoj de d-ro L.L. Zamenhof. Toyonaka 1997.

L.L. Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj. Okaze de la 80-a datreveno de lia morto. André Cherpillod. Courgenard 1997.

Kaŝita vivo de Zamenhof, La. Originalaj studoj. N.Z. Maimon. Tokio 1978.



94-a Universala Kongreso

Bjalistoko, la ĉefurbo de Podlaĥio

La nuntempa Bjalistoko estas inter la vojevodiaj urboj de Pollando la 2-a, se temas pri la loĝdenseco, sed nur la 11-a, se temas pri la nombro de la loĝantaro, kaj la 13-a se konsideri la surfacon.

La arkeologiaj esploroj atestas, ke la unuaj homoj sur la tereno de la nuna Bjalistoko setlis jam en la ŝtona epoko. Dum jarcentoj vivis tie homoj de diversaj kulturoj, do eblas konstati, ke ekde la pratempo la bjalistoka regiono troviĝis ĉe la kulturlimejo.

Laŭ legendo la origino de Bjalistoko ligiĝas kun la litova princo Gediminas, tie ĉasanta en 1320, kiu ripozante ĉe la rivero Biała diris, ke valorus ĉi-loke konstrui ĉasistan domon aŭ establi vilaĝon. Tion asertas legendo. La dokumentoj atestas, ke en la jaroj 1437-1450 la pola reĝo Kazimiro Jagelono atribuis la lokajn grundojn al Jakub Reszka-Tabutowicz, laŭblazone Cigno. La biendomo kaj sekve la bieno Białystok kreiĝis lime de la 15-a kaj 16-a jarcentoj. Sed jam meze de la 17-a jarcento la tereno estis testamentita al la Pola Respubliko kaj kiel reĝa posedaĵo ĝi subalternis al la administracio de Tykocin. En la jaro 1659 la hetmano Stefan Czarnecki, meritiĝinta en la kontraŭsvedaj bataloj, ricevis la urbon damaĝitan dummilite, kiel kompenson pro siaj militmeritoj. Lia filino fariĝis la edzino de Jan Klemens Branicki, kies nepo kiel la unua porkonstante ekloĝis en Bjalistoko. Stefan Branicki ne sole ekloĝis tie, sed la defendan gotikan kastelon transformis en la barokan palacon kaj lia rezidejo akiris la urborajtojn de reĝo Johano la 3-a Sobieski en la jaro 1691.

Tamen la ora epoko de Bjalistoko ligiĝas kun la figuro de lia filo Jan Klemens Branicki. Li estis unu el la plej altrangaj figuroj en la pola ŝtato: granda reĝa hetmano, la krakova kastelestro, la unua laika senatano de la respubliko. Kun sia edzino Izabela li establis en Bjalistoko unu el la plej pompaj kortegoj en la tiama Eŭropo, kiu logis multajn elstarajn artistojn, pentristojn, poetojn kaj homojn de la scienco. Funkciis tie teatro, kortega orkestro kaj baleta ensemblo, gastprezentiĝadis italaj aktorinoj. La kortegon ofte vizitadis polaj reĝoj, Aŭgusto la 2-a, Aŭgusto la 3-a kaj Stanislaŭo Aŭgusto Poniatowski, vizitojn faris la imperiestro de Aŭstrio Jozefo la 2-a, rifuĝejon serĉis tie la reĝo de Francio, Ludoviko la 18-a. En la jaro 1754 la hetmano Branicki establis ĉe la palaco Militistan Lernejon pri Konstruado kaj Inĝenierio, la unuan en Pollando. Funkciis tie akuŝigista lernejo kaj Akademia Lernejo establita de la Komisiono por la Nacia Eduko. Ne mirige, ke Jan Klemens Branicki estas hodiaŭ rekonita la patrono de la urbo.

Post lia morto la urbo transiris en la manojn de la Potocki-familio kaj post la dua dispartigo de Pollando la urbo estis de ili vendita al la prusoj. Komence de la 19-a jarcento estis kreita

bjalistoka adminstracio, kiu eniris la konsiston de la Cara Imperio. Poiome Bjalistoko komencis gravi kiel centro de la teksa industrio – kion impulsis la starigo de la dogana limo inter la Pola Reĝlando kaj la Cara Rusujo en la jaro 1834 – ekde tiam nomata la Manĉestro de la Nordo. Relative baldaŭ, en la jaro 1851, la dogana limo estis forigita kaj la nombro de manufakturoj malkreskis. Sed la urboevoluo favoris la elkonstruo de la varsovia-peterburga fervojlinio, dank’ al kio la nombro de la loĝantaro kreskis rapide. Bjalistokon celis rusoj, judoj, germanoj. Tamen malgraŭ la rusa cenzuro daŭre en Bjalistoko funkciis polaj kulturaj societoj, estis enscenigataj pollingvaj spektakloj, kiel simbolo de sendependigaj agadoj estis elkonstruita pola preĝejo.

Post la eksplodo de la 1-a mondmilito Bjalistoko troviĝis for de la frontolinio, sed en 1915 ĝi estis okupaciita de la germanaj trupoj, kiuj restis tie eĉ ĝis la 19-a de februaro 1919, kiam ili evakuiĝis. Ilian lokon prenis polaj taĉmentoj. Dum la ofensivo de bolŝevistoj Bjalistoko falis la 28-an de julio de 1920 en iliajn manojn, liberigon ĝisatendinte post ne plena monato, la 22-an de aŭgusto 1920. Sekve la intermilita periodo signifis por Bjalistoko ordigon de iom kaosa konstruplano el la aneksoperiodo kaj i.a. establon de novaj parkoj. Meze de la 20-aj kaj 30-aj jaroj oni klopodis modernigi la centron de Bjalistoko, krei reprezentan administracian-oficistan kvartalon.

Post la eksplodo de la 2-a mondmilito en Bjalistokon eniris la germanaj trupoj, sed ne por longe. Rezulte de la pakto Ribbentrop-Molotov la urbo estis transdonita al la Ruĝa Armeo kaj estis enkorpiĝita en la Bjelorusan Sovetan Respublikon. La sovetaj okupaciintoj dum la 19-monata restado aplikis vastskale planitajn reprezaliajn kontraŭ ĉiuj polaj loĝantoj de la urbo, eĉ skoltoj kaj junskoltoj. Kelkdek mil ĝiaj loĝantoj estis ekzilitaj en la profundon de Sovetunio kaj Kazahio, el kiu nombro 90 procentoj pereis. Samtempe rusoj klopodis ĝisfunde forviŝi kiujn ajn spurojn de poleco. La eniro de la germanaj trupoj en la urbon la 27-an de junio 1941 ĉesigis tiujn kontraŭpolajn agadojn, aliflanke germanoj komencis sian restadon per „pacigo“ de la juda kvartalo Chajnaki. Kelkmil ĝiaj loĝantoj estis murditaj, multaj bruligitaj en la loka sinagogo. Meze de julio kaj en aŭgusto la juda loĝantaro estis grupigita en la geto. Ĝian likvidon la getoloĝantoj kontraŭstaris armite, sed la 16-an de aŭgusto la bataloj ĉesis kaj la bjalistoka geto, en kiu pereis multaj esperantistoj, estis likvidita. Denove la trupoj de la Ruĝa Armeo eniris Bjalistokon fine de julio 1944. Oni klopodis instali

tie administracion ligitan kun Stalin. Multaj personoj pro sia patriota agado estis mortkondamnitaj aŭ ekzilitaj al Siberio. Ĝuste ĉi tie, en Bjalistoko, plej longe daŭris la rezisto kontraŭ la okupaciintoj.

La retirigantaj germanoj kaj invadantaj rusoj detruis Bjalistokon 80-procente. La industria povo de la urbo malkreskis je 74 procentoj. La loĝantaro estis ekstermita de 100 mil antaŭmilitaj ĝis 57 mil loĝantoj. La invadintoj konsekvence ekstermis kleran kaj aktivan polan loĝantaron, organizante amasajn ekzekutojn kaj direktante ilin al koncentrejoj. Malgraŭ la militfino la teroro kaj rabado de la okupaciintoj ne ĉesis, male ĝi intensiĝis, ĉar sovetaĵoj traktis Bjalistokon egalarange kun la germanaj urboj, forveturigante el ĝi industriajn infrastrukturon kaj prirabante la loĝantojn.

Nun Bjalistoko estas urbo kun ĉ. 300 mil loĝantoj, la plej granda industria centro kaj unuavice kultura kaj scienca centro de la regiono. Funkcias tie plimulto de la kulturinstitucioj kaj altlernejoj. Temas pri teatroj, filharmonio, muzeoj, artgalerioj, universitato, medicina akademio, politekniko kaj ekonomikaj altlernejoj. La urbo estas unu el la gvidaj centroj de la pupteatra arto. Krom la tiea pupteatro aktivas altlernejo edukanta pupaktorojn kaj reĝisorojn.

Bjalistoko estas la ĉefurbo de la Podlaĥia Vojevodio, unu el la 16 vojevodioj de Pollando, kreitaj baze de la administracia divido de la lando en la jaro 1999. Ĝi troviĝas en la nord-orienta parto de Pollando, en la centro de Eŭropo. En ĝian konsiston eniris parte la iamaj vojevodioj de Łomża kaj Suwałki kaj la tuta iama bjalistoka vojevodio.

En la vastaj arbaroj kaj praarbaroj de la regiono, el kiuj iuj kiel solaj en Eŭropo konservis sian originan karakteron, eblas renkonti abunde unikan faŭnon kaj flaŭron. La plantorico favoras la vivon de la tieaj alkoj, lupoj, linkoj kaj eŭropaj bizonoj en la Praarbaroj de Białowieża kaj Knyszyń. Samtempe la podlaĥia vojevodio apartenas al la ekologie plej puraj regionoj de Pollando.

Per leĝa protekto estis kovritaj preskaŭ 40 procentoj de la vojevodia surfaco. Temas pri tri panoramaj parkoj, 85 naturrezervejoj kaj 2 051 naturmonumentoj. Apartan atenton meritas la kvar tie ekzistantaj naciaj parkoj.

Nacia Parko de Białowieża. La praarbarego de Białowieża konsistigas en Eŭropo la plej bone konserviĝintan naturan arbaron kun origina karaktero. En 1977 Unesko agnoskis ĝin kiel rezervejon kadre de la esplorprogramo Homo kaj Biosfero (M&B), kaj ekde 1979 ĝi troviĝas en la listo de la Monda Heredaĵo, kiel unusola natura objekto en Pollando. Temas pri la plej malnova pola nacia parko.

Nacia Parko de la Biebrza-rivero estas la plej granda nacia parko en Pollando. Ĝiajn plej valorajn ekosistemojn konsistigas famaj marĉoj. Samtempe temas pri la – en Pollando kaj la Centra Eŭropo – plej natura komplekso de malaltaj, mezaj kaj altaj torfejoj kun specifa flaŭro, karakteriza por riveraj valoj kun tre riĉaj kaj variaj birdospecioj. La marĉoj de la Biebrza-rivero estas kovejo por multaj birdospecioj ligitaj kun la marĉa medio, la plej grava ne nur en Pollando, sed ankaŭ en la tuta Centra kaj Okcidenta Eŭropo. La parko estis adoptita de Internacia Konferenco RAMSAR, protektanta kotajn terenojn kaj birdokovejojn.

Nacia Parko de la Narew-rivero etendiĝas en la valo de la supra riverfluejo de Narew. La parko protektas marĉojn, akvoriĉajn terenojn kaj akvajn basenojn, tie dominajn ekosistemojn, okupantajn 90 procentojn de la surfaco. La valo de la Narew-rivero kun riĉa sistemo de riverfluejoj estas natura kuriozaĵo en ĉi tiu parto de Eŭropo, difinita kiel „la Pola Amazonio”. Granda valoro de la parko estas la varia kaj riĉa birdospeciaro. Nestas tie multaj birdoj, kies ekzisto estas endanĝerigita.

Nacia Parko de la lago Wigry. Ĝia plej granda atuto estas akvoprovizoj, kiuj antaŭkondiĉas la belecon de la tieaj panoramoj kaj unikan naturan valoron de la tereno. En la parko troviĝas 42 naturaj akvobasenoj. La plej granda, plej profunda kaj plej alloga estas la lago Wigry kun pluraj insuloj, golfetoj, akvoprofundaĵoj kaj ĉebordaj malprofundaĵoj. Sed la akvoriĉo, krom la lagoj konsistas ankaŭ el belegaj riveroj, rojoj kaj fontoj. La lago Wigry pro siaj eksterordinaraj valoroj estis lokita de la Internacia Unio de Naturprotekto en la „Projekto Aqua”, sur la listo de la plej valoraj ekosistemoj de la mondo.

Posedante ĉiujn ĉi naturtrezorojn la podlaĥia vojevodio estas regiono kun grandega, sed ankoraŭ ne plene utiligata turisma potencialo pro nesufiĉaj tranoktolokoj kaj infrastrukturo. Tamen malgrandaj urboj, interesaj konstruaĵoj, lokoj de religia kulto, rava naturo kontribuas al la etoso kaj unika ĉarmo de la vojevodio. La vojevodio apartenas ankaŭ al la plej variaj en Pollando laŭ la etna kaj kultura vidpunktoj. De jarcentoj najbaras tie reprezentantoj de diversaj nacioj kaj konfesioj. Krom poloj loĝas tie bjelorusoj, litovoj, tataroj, rusoj, ukrainoj, romaoj, judoj. En la podlaĥia vojevodio troviĝas la plej multnombra grupiĝo de ortodoksuloj en Pollando.

La podlaĥia vojevodio havas agrikulturan karakteron. Oni kultivas tie ĉefe grenon kaj terpomojn. Ĝi famas pro siaj laktaĵoj kaj kortbirdaĵoj kaj viandaĵoj. Ankaŭ la industrio estas ligita ĉefe kun la produktado kaj prilaborado de nutraĵoj. Sed krome oni produktas en la regiono maŝinojn, teksaĵojn, lignon kaj lignaĵojn. La vojevodio intime kunlaboras kun la landoj el la Balta regiono, kadre de la eŭroregiono „Niemen”. Ĝi ankaŭ tenas kontaktojn kun amikiĝintaj regionoj en Italio, Francio, Finnlando, Germanujo kaj Svedujo.

Gabi Kosiarska, Barbara Pietrzak



Domo ĉe la strato Piękna 3 en Bjalistoko, kie estas la sidejo de Bjalistoka Esperanto-Societo.

Venecio kaj Mediteraneo

Alia Venecio. Predrag Matvejević. Trad. T. Chmielik. Czeladź: Hejme — Libro-Mondo, 2006. 144p. 19cm. ISBN 8392028929. Prezo: € 12,00. **Mediterranea breviero.** Predrag Matvejević. Trad. T. Chmielik. Bydgoszcz / Svidniko: Skonpres / Libro-Mondo, 2007. 231p. 21cm. ISBN 9788389962065. Prezo: € 17,70

La historio de Venecio estas skribita kaj mi ne scias, kion novan mi povus aldoni; per tiu frazo komenciĝas unu el la sennumeraj ĉapitroj de la verko *Alia Venecio*, de la kroato Predrag Matvejević, doktoro de Sorbono, orda profesoro pri slavistiko en Romo, pluruniversitate honora doktoro, verkisto, vicprezidanto de PEN-klubo, gajninto de sennombraj premioj, vojaĝanto, intelektulo por kiu la sorto de Mediteraneo ne estas indiferenta. Male al lia diro, en la menciita verko troviĝas multo nova pri malnovaĵoj, pri detaloj, pri eta vivo, pri kutimoj, pri historiaj nomoj, nu, entute multo, kion oni ne trovas en la turistaj gvidlibroj. Troviĝas tio, kion supraĵa turisto ne serĉas, blindigite de aliaj briloj kiel Placo Sankta Marko aŭ la Granda Kanalo. Por rakonti pri kanaletoj, fiŝkaptistoj, patronaj sanktuloj necesas Venecion ne nur koni, sed ankaŭ ami. Tial la leganto estas mane tenata, sekvante la rakontojn pri panistoj kaj panspecoj, pri barbiroj kaj iliaj raziloj, pri la tombejo por hundoj, aŭ pri la malnovaj, ordinaraj, nerenomaj gastejoj, kiujn la aŭtoro nomas „la plej belaj, sovaĝaj floroj de Venecio“.

Post legado de ĉi tiu libro vizitu Venecion kun *alia* sento de enpenetro en la vivon, kvankam, kompreneble, ne neglektante la admiradon de famaj monumentoj. Sed estu avertita: penetras la verkon sento de melankolio, de nostalgio pri urbo kiu ne ekzistas plu, de kiu nur paliĝintaj ŝildoj aŭ formortantaj vortoj atestas pri iama vivintenso. Ŝajne la aŭtoro volas surpaperigi ion rapide, por ke la vento de forgeso ne forportu tion, kio Venecio estis kaj kio faris ĝin unika: la ĉiutaga vivo de la unuopuloj, ne ja de la doĝoj; la peno de la ŝipanoj, ne ja la brilo de la admiraloj, la senkverela kaj harmonia kunvivo de multaj etnoj, kiuj ĉiuj trovis en Venecio sian hejmon, sian deponejon, sian panodonan komercon, sian prosperon. Kaj harmonie kunvivis multaj lingvoj, multaj monsistemoj, kvankam la Venecia dukato, kun ora titro senŝanĝe stabila dum kvar jarcentoj, estis la monunuio universale akceptata de la tuta centra-orienta Mediteraneo. Patinon de pasinteco aldonas ankaŭ la multaj malnovaj kaj raraj planoj kaj desegnoj de Venecio, kiuj ornamas la ĉapitrodividajn paĝojn. Interkulturon peras la cito de multaj etnolingvaj vortoj el la itala, turka, kroata, hispana, dalmatia dialekto ktp.

Perfekte kongruas kun la verko la antaŭparolo de Renato Corsetti, kiu vidas en la sereneco de la iama venecia vivo la plenan respekton de diverskultureco kaj de la „nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio“; tiu respekto nun ne estas plu, kaj oni devas strebi al ĝia reakiro.

Alia samaŭtoro libro estas *Mediterranea breviero*. La titolo ĉekomence dubigas, ĉu temas, laŭ la NPIV-difinoj pri „latina preĝlibro por katolikaj pastroj“, aŭ pri „konstante kaj volonte relegata libro“; jam ĉe la unua paĝo evidentas ke temas pri la dua signifo. La libro konsistas el tri partoj, fikcie disigitaj kvazaŭ malsamaj, sed ili konsistigas kontinuo: samas la stilo rakonta, samas la gusto privorta, samas la respekto al diverseco.


La unua parto, *Breviero*, temas pri longa ekskurso de unu bordo al la alia de Mediteraneo, renkonte al popoloj kaj kutimoj, al havenoj kaj urboj.

La dua parto, *Mapoj*, prezentas grandan nombron de vidperspektivoj: vidas la maron ne nur ni, do ni atentu ankaŭ, kiel vidas ĝin la aliaj. La kolekto de antikvaj mapoj estas ege interesa, kaj kutime ne prezentata kune en unu verko.

La tria parto, *Glosaro*, estas, se tiel diri, la plej amuza. Ĝuste diverseco de vortoj kaj de kutimoj amuzas la aŭtoron: la fono estas la maro, la havenoj, la surmaraj trafikiloj, la surmaraj trafikantoj, la submaraj vivuloj, la apudmara flaŭro, la ĉemaraj popoloj, la maraj bordoj, do entute fono homogena, kie maro estas vidata, aŭdata, spirata, priparolata de ĉiuj protagonistoj. Sed la vortoj estas tute malsamaj, unu popolo evidentigas unu econ, alia alian: „la maro estas absoluta, kaj ĝiaj nomoj – relativaj“. Ĉi tiu parto estas longa ekskurso ne en la diversaj lokoj, kiel la unua parto, sed en la diversaj nomoj de la marrilataj objektoj, kun abundaj historiaj citaĵoj, kun referencoj al tekstoj kaj aŭtoroj malmulte konataj. Tiel sub la leĝera masko de rakontoj sin kaŝas veraj leksikografiaj lekcionoj: trovas ĉi tie sian historion nomoj de lokoj, de bestoj, de aĵoj, de metioj, de plantoj; paragrafoj malofte pli ol dupaĝaj, ĉiu kun specifa subtemo, sed ĉiam traktataj kun humuro kaj, ĉu dirinde? kun ioma melankolio. La aŭtoro estas ankaŭ (li diras: ĉefe) defendanto de la homaj rajtoj, aparte atenta pri la evoluo de la politika situacio en la balkanaj landoj, kiun li pritraktas en pluraj libroj. Bedaŭrinde la ora epoko en kiu Mediteraneo estis konko de paca kunesto, se iam ĝi estis entute, formortis, kaj tiun bedaŭron oni sentas en liaj paĝoj.

Entute, ambaŭ verkoj ege legindas: oni multon lernas pri historio per historioj, oni ekamas ami Venecion kaj Mediteraneon, oni amuziĝas per la ĉarmo de la rakontado. Laste, sed ne plej malgrave, la lingvaĵo de la traduko de Tomasz Chmielik el la kroata estas glata kaj facila, kvankam neniam ŝablona aŭ banala, ĝuebla kaj por ĵusaj komencantoj kaj por spertaj literaturistoj.

Carlo Minnaja



Grava pro malofteco

Ĉu vi konas Blaise Cendrars? Manuel de Seabra.

Vieno: IEM, 2007. 86 p. 23cm. ISBN 3010000332.

Prezo: € 12,30

En la Esperanta romanarto superregas kelkaj kategorioj. En fruaj epokoj ofte temis pri verkoj ideaj aŭ idealismaj en iom eksmoda stilo. En la lastaj jardekoj krimromanoj, ofte sen tre altaj pretendoj literaturaj, okupis ampleksan parton.

Inter la relative malgranda parto, kiu ambicias iom pli, dominas tradicia rakonta stilo. Eĉ kiam la lingvo estas eksperimenta, la strukturo kaj verka tekniko ĝenerale restas pli klasika. Kaj malofte oni trovas realisman rilaton al nia moderna socia kunteksto.

La tria Esperanta romano de Manuel de Seabra estas alia. Ĝia temo tuŝas politikon de ĵusa epoko – la militadon de portugaloj en Angolo kaj la vivon de junaj homoj en malfruaj jaroj de faŝismo. Pri juna viro en tiu ĉi kunteksto verkas de Seabra per tekniko mozaike modernisma, kie alternas kaj fojfoje miksiĝas scenoj el diversaj lokoj kaj tempoj. La aŭtoro fidus je granda kapablo kaj preteco ĉe la leganto por mem interpreti la rilatojn kaj imagi la subtekston. Ĝuste tia fido maloftas ĉe aliaj Esperantaj verkistoj.

En la kadra rakontofadeno Konrado, la protagonisto, kuŝas atendante malrapidan morton post dismembrigo pro eksplodinta mino sur la Angola savano. Tiu fadeno tamen estas nur eta parto de la verko. En ĝin plektiĝas du ĉefaj fadenoj: ĉiutagaj travivaĵoj de la portugala soldatoj en la Angola milito, kaj amafero de Konrado dum liaj studentaj jaroj. Ambaŭ estas

bone scenigitaj. La unuan oni sekvas sen gravaj problemoj spertante la angoron kaj fremdecon de la soldatoj. En la dua aperas multaj dialogoj inter Konrado kaj Nelly, filino de riĉa patro. Tiuj interparoloj estas tre elvokivaj sed ankaŭ enigmaj. Mia imagpovo ofte ne sufiĉas por vere kompreni, kion pensas la duopo sub tiuj fragmentaj replikoj. Jen kaj jen eĉ nebulas, kiu diras kion. Tamen mi preferas ĉi tian dialogon ol platan interŝanĝon de informoj, kie ĉio eksplicitas.

"Estas bone dormi kun iu, kiun oni amas reale."

"Kun problemoj?"

"Vi maltrafis la trajnon."

"Nur la Mezepokon."


"Kaj oni daŭre ŝajnigas, ke ni estas homidoj."

Kvankam la partoj kie prezentiĝas tiu amafero vere plaĉas al mi, tamen mi ne sukcesas formi tre vivan imagon pri Nelly, la amatino. Male, la mio Konrado iom post iom ekhavas pli klaran konturon. Li estas malriĉa intelektulo, ne tre iniciatema, kiu amas Blaise Cendrars. Libro de tiu svis-franca poeto, perdita sur la savano, iĝas elirpunkto de originala kaj interesa rakonto pri interŝanĝado de libroj kun nekonata angola gerilano.

Ne eblas legi ĉi-teman romanon sen pensi pri verkoj de António Lobo Antunes, precipe *Os cus de Judas*. Oni tie ja retrovas kelkajn komunajn ingrediencojn, tamen ne tre simile traktitajn.

Ĉu vi konas Blaise Cendrars? ne estas tre ampleksa kaj tamen enhavas relative multon. Eble iuj eroj povus prefere forfali por lasi spacon al plia profundigo de aliaj. Ekzemple aperas kelkaj paĝoj iel proze poeziaj, kiuj konsistas ĉefe el aero. Tamen sume mi trovas la verkon grava, ĉefe pro la malofteco de kompareblaj provoj en Esperanto. Ĝi estas romano kiu postulas ion de sia leganto, sed kiu rekompencas tiun, kiu pretas legi aktive.

Sten Johansson



Verko bona, informa kaj pensiga

Esperanto – Terminologie und Terminologiearbeit.

Wera Blanke. New York: Mondial, 2008. 153p.

22cm. ISBN 9781595690777. Prezo: € 15,00

Kun Wera Blanke mi konatiĝis antaŭ pli ol tridek jaroj en unu el la interlingvistikaj seminarioj en ĉevistula konferenceto apud Varsovio. Mi ĵus estis eklaborinta en industria esplorprojekto, kie oni inter multo alia kun altaj kostoj profesie laboris pri terminologio por uzo en perkomputila tradukado. Dum la tagmanĝa konversacio mi demandis al Wera, kio en terminologio estas tiel fascina, ke indas tute senpage dediĉi al ĝi sian tutan libertempon. Ŝiaj okuloj ekbrilis kaj mi ne bezonis plu ion diri dum tiu manĝo.

Kio do estas tiu terminologio? Ĝi estas klopodo de praktikuloj aktive stiri, kie la teoriuloj deziras pasive observi. Tiu stiremo estas io profunde Esperanta. Ni memoru: Fine de la 19-a jarcento

la eŭropa lingvistiko forlasis la ĝistiaman lernejecan, stiran kaj preskriban sintenon al sia objekto, la homa lingvo, kaj sin turnis al observa, analiza kaj priskriba aliro. La lanĉo de planlingvoj do rekte kontraŭis tiun spiriton. Zamenhof kaj liaj kolegoj agadis por akceptigi la ideon ke ja eblas kaj ja utilas per aktiva, intenca kaj laŭplana laboro krei pli bonan lingvon.

Zamenhof tamen tre bone konsciis ke multe pli facilas stiri la lingvon, dum la aŭtoro estas la sola persono kiu ĝin konas, kaj ke multe malpli facilas stiri lingvon jam uzatan de multaj homoj. Malsamkiel ekzemple Schleyer, Zamenhof post la lanĉo de Esperanto multfoje emfazis ke stiras ne li, sed „la uzo“.

Terminologio estas klopodo tamen stiri lingvojn jam vaste kaj longe uzatajn. Stiri ilin en sfero de neĉiutaga uzo, kie stiro estas bezonata kaj akceptata. La terminologio estiĝis en la unua duono de la 20-a jarcento. Ĝi ne celas krei novan, pli bonan lingvon, sed ĝi volas igi la jaman lingvon pli bona. Ĝi strebas per aktiva, intenca kaj laŭplana laboro difini fakajn konceptojn, aranĝi la

konceptojn en sistemoj kaj doni al la konceptoj vortojn en la diversaj lingvoj.

La berlinano Wera Blanke, pro kies sepdekkvinjariĝo en 2008 mi elkore gratulas, de jardekoj fervore agadas por terminologio. Ŝia jusa libro spiras fascinon pri la koncepta pliesprimivigo de la lingvo kune kun senlaca strebo dokumenti kaj montri la impulsan konekton inter la plana kreado de lingvoj kaj la plana evoluigo de la terminprovizo. Ŝia libro enhavas ses artikolojn, kvar en la germana kaj du en la angla. Ĉiuj aperis pli frue, sed jen la volumo prezentas ilin al ni en formo kolektita kaj facile alirebla.

Ne estas hazardo, tion multifacete montras la artikolaro, ke du el la plej centraj aktivuloj de la estiĝanta terminologia scienco kaj de la ekestanta terminografia praktiko estis esperantistoj. Ja ilin inspiris la lingvoplanada stiremo pruntita el Esperanto. Temas pri Eugen Wüster, aŭstra inĝeniero kaj industriulo, kiu fondis la terminologian sciencon. Temas same pri Ernest Drezen, sovetia inĝeniero el Latvio, industriulo kaj partia kaj Esperantomovada aktivulo. Wüster kaj Drezen ĉerpis el sia industria sperto pri la bezono kaj utilo de teknika normigo kaj konstatis la paralelan neceson de normigita faka lingvaĵo. Kiel agemaj homoj, ili ne nur pledis ke io estu farata – sed faris. Wüster kaj Drezen forte engaĝiĝis en la fondado kaj funkciigo de industriaj kaj ŝtataj normkomisionoj kaj enkondukis en ties laboron la ideon okupiĝi

ne nur pri la teknikaj produktoj mem, sed ankaŭ kaj ne malpli grave pri la faka lingvaĵo.

Krom la agado de Esperante inspiritaj aktivuloj en la etnolingva terminologio Wera Blanke en sia nova libro ankaŭ priskribas la vastan kaj multcentran terminologian kaj terminografian laboron ene de la Esperanta lingvokomunumo mem. Antaŭ ĉiuj menciindas la Terminologia Esperanto-Centro, por kies starigo Wera Blanke mem tre agadis, sed ankaŭ la iniciatoj de aliaj aktivuloj kiel *Slipara Vortaro* kaj *Pekoteko* de Rüdiger Eichholz.


La ĝenerala ideo, kiu konektas la artikolojn de Wera Blanke en kaj ekster ĉi tiu libro, estas io, per kio ŝi mem resumas la laboron de alia aktivulo: La strebo evoluigi fakan lingvaĵon per libera diskuto inter ĉiuj interesitoj. Tio estas la esenca metodo de terminologio. Ne eblas stiri sen atingi konsenton. Do terminologio estas ekvibrado inter aŭtoritato kaj libereco.

Bona, informa kaj pensiga verko. Kaj, se vi parolas la germanan kaj la anglan, aĉetu, studu, inspiriĝu, pluportu.

Klaus Schubert



Sukcesa rekreo



Hodler en Mostar.
Spomenka Štimec.
Pisa: Edistudio, 2006.
105 p. 21cm.
ISBN 9788870360738.
Prezo: € 16,50

Jam de pluraj jaroj mi apenaŭ legas (kaj verkas) fikcian prozon, do ankaŭ ne pli fruajn romanojn de la kroata aŭtorino Spomenka Štimec, kiel *Tilla* (2002). Jen do mi eklegas la 100-paĝan *Hodler en Mostar*, de 2006. Pri kiu Hodler temas? Ĉu pri Hector Hodler, la juna sviso kunfondinta UEA? Ne pri li, sed pri lia patro, la fama svisa pentristo Ferdinand Hodler, pri kiu (konfesinde) mi neniom sciis ĝis la apero de tiu ĉi libro. Fakte, pli ol pri la patro, temas pri lia franca modelino kaj ama(n)tino, Jeanne Charles, kaj pri aliaj homoj en la vivo de ambaŭ. Oni povus diri, ke en ĉi rakonto ekanta en 1901 neniun rolulo absolute superelstaras aŭ ĉefrolas, ili ĉiuj estas diversgravaj fadenoj en la vefto de la romano.

Kaj pri kiu Mostaro temas? Ĉu pri tiu atakita kaj bombita en 1992? Nu, ne unuavice pri tiu, sed ankaŭ. Ĉar la varpon de Hodler en Mostar konsistigas scenoj kaj eventoj en diversaj tempoj kaj urboj, en Eŭropo kaj Ameriko, de Ĝenevo kaj Berno ĝis Mostaro; ankaŭ la du mondmilitoj, la fulma sinsekvo de novaj inventoj (kiel radio, fridujo, aŭtoj, Jugoslavio), la islama kulturo en Hercegovino aŭ, pretere kaj preskaŭ akcesore, la

lingvo Esperanto mem per la figuro de “nia” Hodler, la juna Hector.

Ŝtimec uzas en ĉi romano stilon simplan kaj klaran. Mi riproĉus nur la uzon de “stud(aĵ)o” (10-foje sur p. 12) anst. “etudo” (p. 100); misuzon de “po” (p. 17: “pagi ses kronojn *po biciklo” anst. “po ses kronojn por biciklo”); transitivan “evolui” anst. “evoluiĝi” (p. 32, 88); la vorton “mentaleco” anst. “pensokadro, mens-aranĝo” (p. 33; kion signifu “*mentala”?); “vesti” anst. “porti, surmeti, surhavi” (p. 43); “pipo” anst. “tubo” aŭ “pipeto” (p. 54); “*numizmatikisto” anst. “numismato” (p. 104); kaj ĉu eble “modlilo” (p. 81) estu “muldilo”? Krome, jen demandoj por vortaristoj: Ĉu viroj uzas “ŝalon” (p. 22)? Ĉu ole-pentraĵon (laŭ NPIV oleopentron) oni povas nomi “oleaĵo”? Kio estas “ripo de ponto” (p. 83)? Ĉu turtoj povas ĉirpi (p. 94)? Oni notu ankaŭ “necesabo” (p. 76; mi mem preferas diri “neprujo”) kaj “boema” (p. 88), anst. la konfuza “bohem(i)(ec)a”.

Tio estas tamen nur detaletoj en lingvaĵo ĝenerale flua kaj natura, des pli en la tre viglaj kaj versimilaj dialogoj. Kiugrade ili respegulas la efektivajn konversojn de la roluloj, tio nun ne gravas; gravas nur, ke Štimec sukcesas krei aŭ rekrei la vortojn kaj la homojn kredeble vivaj antaŭ la okuloj de la leganto.

Hodler en Mostar prezentas rapidan, nerekta enkondukon ne nur en la vivon kaj verkaron de koninda pentristo, sed ankaŭ en periodon de la monda historio, konkrete de Eŭropo, kaj eĉ de la historio de Esperanto. La romano de Štimec parolas al ni ne fakiste pri tiu aŭ alia pentraĵo, sed pri vivo kaj morto, pri la ĉiostompa tempopaso.

Fine, la noto sur p. 4 kaj la Postparolo, sobre parolanta pri militoj (specife pri tiu de 1992), kvazaŭ petas la leganton helpi retrovi du ŝtelitajn pentraĵojn de Hodler, inter ili la memportreton kiu rezolute ilustras la kovrilon.

Jorge Camacho

La lastan Zamenhof-tagon festis esperantistoj en Brazilo, Ĉinio, Hispanio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Japanio, Pollando, Usono, Tajvano, Vjetnamio – kaj certe ankaŭ en aliaj lokoj de nia vasta Esperantujo. Jen raportetoj pri kelkaj el ili.

Bjalistoko



Antaŭ la domo kun murpentraĵoj de Zamenhof, Ŝapiro kaj aliaj bjalistikaj esperantistoj.

En Bjalistoko, la urbo de la 94-a UK, okazis de la 12-a ĝis la 15-a de decembro 2008 la 9-aj Bjalistikaj Tagoj de Zamenhof. Kadre de la aranĝo kunsidis ankaŭ la kompleta 20-membra LKK de la Bjalistoka UK.

La solenaĵoj komenciĝis vendrede vespere per arta prezento de junaj artistoj el la Bjalistoka Muzik-Lernejo. Sabate en la Urba Biblioteko prelegis P. Wierzbowski, T. Chmielik kaj R. Dobrzyński kaj posttagmeze okazis renkontiĝo ĉe la monumento de L.L. Zamenhof. Ĉe la monumento lasis kronflorojn nome de la urba estraro la vicurbestro de Bjalistoko kaj samtempe prezidanto de LKK de la 94-a UK Aleksander Sosna. Oni vizitis la domon kun murpentraĵoj de Zamenhof, Ŝapiro kaj aliaj bjalistikaj esperantistoj. Post la Sankta Meso en Esperanto okazis renkontiĝo en la kafejo Fama, kie la organizantoj regalis la gastojn per granda torto okaze de la 149-a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof (sur la suba foto). La vesperon agrabligis belegaj artaj prezentadoj de infanaj ensembloj. Dimanĉe okazis ekskurso tra la bjalistoka ĉrkaŭaĵo, i.a. al la fama sanktejo Rózanystok. Lunde okazis eksterordinara festo, dum kiu la elementa lernejo n-ro 51 en Bjalistoko ricevis la nomon „Ludoviko Zamenhof“. La 9-ajn



Bjalistikajn tagojn de Zamenhof gvidis la prezidantino de Bjalistoka Esperanto-Societo Elizabeta Karczewska kaj bonvolaj helpantoj, anoj de la societo.

Raportis kaj fotis:
Andrzej Sochacki

Dublino

La 13-an de decembro, por (iomete frue) celebri la Zamenhof-tagon, „sabata rondo“ de la Esperanto-Asocio de Irlando vizitis la nacian muzeon ĉe la iama Kazerno Collins. La membroj kune tagmanĝis en bona restoracio ĉe la muzeo, antaŭ ol rigardi la nuntempe ekspoziciatan kolekton de Albert Bender (1866-1941), kiu naskiĝis en Dublino, kiel filo de la Rabeno Bender. Lia riĉega kolekto konsistas el orientaĵoj. Samtage RTE, la nacia radio-stacio, dissendis kadre de la programo „Spektro“ intervjuon pri Esperanto kun Zbyszek Zalinski kaj Garbhan MacAoidh.

Garbhan MacAoidh

Rio-de-Janeiro

Dimanĉe la 21-an de decembro en la aŭditorio de la Biblioteko Machado de Assis, kvartalo Botafogo, Rio-de-Janeiro, okazis Zamenhofa festo. Ĝi efektiviĝis kadre de la V-a Esperanto-Forumo de Botafoga Esperanto-Nukleo kaj de la II-a Esperantista Renkonto de la Sudkvartaloj de Rio. Kvindeko da esperantistoj sekvis la programon, kiu konsistis el solena malfermo fare de Sueli Santos, prelego de Sylla Chaves pri „Esperanto kaj publikaj rilatoj“ kaj forumo pri la temo „Esperanto kaj frateco“. Al la arta programo kontribuis la kantistinoj Neide Barros Rêgo kaj Dirce Sales, deklamis Geny Sardenberg. La evento finiĝis per komuna kantado de la Esperanta himno.

Vendrede la 19-an de decembro kvindeko da homoj kunvenis en la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj por sekvi la jam tradician Zamenhofan feston. Salutparolis la prezidanto de KKE, Givanildo Ramos Costa. Sekvis koncerto de la kantistino Neide Barros Rêgo. La festo finiĝis per transdono de kristnaskaj donacoj al „nekonata amiko“ kaj bongusta lunĉo.

Aloísio Sartorato



La 10-a Tago de la Gepatra Lingvo



De kelkaj jaroj februaro fariĝis en nia E-lingva komunumo monato laborsprona laŭ la aferkerna kaj la informa vidpunktoj.

La 10-an fojon en la jaro 2009, la 21-an de februaro, oni solenas la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo laŭ

la proklamo de Unesko. Esperantistoj en la tuta mondo ĉiam pli aktive utiligas ĝin por atentigi pri la neceso protekti la lingvan heredaĵon de la mondo, havante viglan konscion, ke la lingva riĉo estas reale minacata. Tiucele ĉiam pli kuraĝe oni diversloke organizas kaj partoprenas, ĉiam pli ofte oni kunorganizas kaj kunpartoprenas porokazajn eventojn en kaj ekster siaj kluboj, societoj, grupoj.

Tiaj eventoj estas okazo komune enpensiĝi pri la ŝanĝiganta mondo, en kiu la procezoj de la tutmondiĝo signife influas la situacion de la gepatraj lingvoj, multkaze endanĝerigante ilin. Tio okazas ĉiam, kiam ekzemple oni forprenas de la infanoj la rajton edukiĝi en la gepatra lingvo, kiam oni forprenas en miksitaj familioj la rajton uzi la denaskan lingvon de unu el la gepatroj, kiam oni trudas la lernadon de fremda lingvo de la plej fruaj vivojaroj, ofte jam infanvariete.

Ĉi-jare mi aparte rekomendas dum niaj kunvenoj preni en konsideron la starpunkton de UEA pri la lernado de fremdaj lingvoj, prezentitan laŭ invito de la Homrajta Konsilio de UN en Ĝenevo. En ĝi UEA apogas la lernadon de du, tri aŭ kvar lingvoj laŭ certaj cirkonstancoj. Unue la gepatran lingvon, sekve la regionan, se ĝi estas alia ol la unua, laŭvice la nacian lingvon, se ĝi diferencas de la du unuaj. Fine UEA apogas la lernadon de Esperanto, kiel internacian lingvon apartenantan al neniŭ nacio.

Ĉi-jare preskaŭ tuj post la Tago de la Gepatra Lingvo ni komencas nian tradician Semajnon de Internacia Amikeco. Ĉiam pli ofte ĝi ne limiĝas al la perado de salutoj inter la geesperantistoj. Konforme al la firmiĝanta tradicio organizi tiuokaze iun eventon, per kiu ni alparolas nian medion, en kiu ni lernas, studas aŭ laboras, ni povas fari tion reference al la temo de nia Jubileo UK en Bjalistoko „*Krei pacan ponton inter la popoloj*”: *Zamenhofhodiaŭ*. Tiel ni povos kontribui al disvastigo de la ideoj de la kreinto de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof. Tiuj ideoj daŭre aktualas, tiujn ideojn daŭre bezonas la mondo.

Dezirante al ĉiuj sukcesan arangon de tiaj porokazaj eventoj mi petas ne forgesi pri sendotaj raportoj, kiujn ni uzos por reciproke informi unuj la aliajn pri niaj aktivadoj, ankaŭ por riĉigi nin reciproke per ideoj utiligotaj en niaj pliaj aktivadoj.

Barbara Pietrzak

Anoncetoj

Unu vorto = 1 €. Ni ne respondecas pri la enhavo. **Ripeto ne rajtigas rabaton.** Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ **Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.**

Paroladoj de Ivo Lapenna: Ĉu vi posedas bonan surbendigon de „La Adiaŭa Parolado“ de Ivo Lapenna en Hamburgo 1974 aŭ de aliaj liaj paroladoj ne-eldonitaj sur KD? Bv. kontakti s-inon Birthe Lapenna, Grøndalsvej 30, DK-2000 Frederiksberg, Danio; rete: lapenna@mail.dk.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. S-ro Mehmet Telyakar, Rasimpasa Mah, Prof. Macit Erbudak Sok. No:17, Kadıköy-Istanbul, Turkio.

KOTIZTABELO DE UEA POR 2009

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2009.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	36	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Belgio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	7	18	45	29	18	90
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	425	2100
Danio/krono	70	175	440	280	180	880
Estonio/krono	100	240	600	380	245	1200
Finnlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Francio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Germanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Greklando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hispanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hungario/forinto	1600	4000	10000	6400	4000	20000
Irlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Islando/eŭro	10	24	59	35	21	118
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Japanio/eno	1500	3700	9200	5500	3300	18400
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Latvio/lat	4	11	27	17	11	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zlot	20	50	130	80	50	260
Portugalo/eŭro	8	20	50	32	20	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	17	84
Slovenio/eŭro	7	18	45	29	18	90
Svedio/krono	90	220	550	350	220	1100
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	79	47	28	158
TARIFA A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFA B/eŭro	5	12	30	18	11	60

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFA A: Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFA B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado
MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*
DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO
SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Kaj tiuj kiuj arde deziras esti membroj

En pli fruaj numeroj de tiu ĉi revuo aperis artikoloj pri paperaj tigroj, retaj leonoj, senpaga „membrec“ kaj similaj ideoj por pligrandigi nian laborkapaciton, finance kaj persone.

Individuaj membroj, paperaj tigroj kaj retaj leonoj

Jarfine mi sendis mesaĝon al ĉiuj individuaj membroj de UEA, kies retadreson ni havas (3 457). El tio ni povas konkludi ke iom pli ol 60% de nia tuta membraro havas retaliron.

Ekde tiu ĉi momento ni do ankoraŭ ne povas starigi la demandon: ĉu daŭre sendi en papera formo la revuon kaj la Jarlibron aŭ transiri al nur reta dissendo.

La ĉefa avantaĝo por la Movado estus, ke pli da mono restus disponebla por la diversaj agadoj, ĉar oni ŝparus preskoston kaj sendokoston.

Malavantaĝo por la membroj estus, ke ili ne plu povus legi la revuon, aŭ konsulti la Jarlibron sen komputilo apude. Kaj kvankam ŝajne multaj havas retaliron, tio ne signifas, ke ili havas komputilon ĉe si hejme. Aŭ ke ili povus libere kaj sen aldona kosto aliri komputilon.

Individuaj membroj, kiuj jam ne plu deziras ricevi la revuon kaj Jarlibron en papera formo, povas informi pri tio la Centran Oficejon, kiu ekde tiam blokos la sendon.

Ĉu estonte transiri al nur retaj membroj

Kaj presado kaj dissendado de grandaj kvantoj estas malpli kosta por ekzemplero ol presado kaj dissendado de malgranda kvanto da revuoj kaj Jarlibroj.

Do nur kiam nia individua membraro opinios, ke papera sendo de la revuo kaj Jarlibro ne plu necesas, tiam pli da mono restos disponebla por la disvastigo de Esperanto internaciskale.

Tial la Estraro volonte aŭdos la opinion de niaj membroj pri tio, ĉu papere, ĉu rete.

Aligitaj retaj membroj

Ankaŭ la aligitaj membroj de UEA estas gravaj por la laboroj. Se landaj asocioj povus disponigi iliajn retadresojn, ni povus pli rapide atingi ilin por peti (retan) kunlaboron ekzemple ĉe la lastatempa kampanjo por la propono pri instruado de Esperanto en Usono aŭ ion alian. Tiam nia potenciala laborforto

neimageble pligrandiĝus. Kaj al ili same kiel al ne-membroj kies retadreson ni havas, eblus sendi retan novajleteron kelkfoje jare, sen aldonaj kostoj.

Kaj tiuj kiuj arde deziras esti membroj

En la movado estas multaj (junaj) esperantistoj kiuj arde deziras esti membroj de UEA. Ĉar esti membro de UEA ne signifas nur ricevi la revuon kaj Jarlibron kaj informiĝi pri tio kion aliaj faras, sed esti membro de UEA signifas esti monde ligita kun tiuj samideanoj kiuj laboras por la disvastigo de Esperanto, povi fariĝi delegito aŭ fakdelegito, tiel proponante al aliaj sian helpon pri specifaj aferoj, aŭ povi fariĝi komisiito, komitatano aŭ estrarano, kaj tiel kunstiri la Movadon.

Mia aludo en la unua frazo celas ĝuste tiujn esperantistojn kiuj arde deziras ligiĝi al nia internacia rondo, kiuj arde deziras kunlabori kiel (fak)delegitoj kaj kiuj eventuale povas fariĝi kunstirantoj estonte.

Sed, tiuj esperantistoj loĝas en landoj kie la vivkondiĉoj ne permesas al ili pagi la kotizon por nia internacia rondo, kie tamen la movado kreskas malgraŭ iliaj financaj malebloj. Ili estos i.a la nova generacio, kiu traboros la monton granitan.

En la lastaj jaroj, Fondaĵo Canuto, Institucio Hodler kaj Fondaĵo Azio povis pagi la kotizon por ĉirkaŭ 750 nepagipovaj membroj. Bedaŭrinde ne eblas pagi la kotizon por ĉiuj, kiuj ne nur deziras esti membroj, sed kiuj ankaŭ povas kaj volas internacie ludi sian rolon. Ekzemple en la nuna estraro José Antonio Vergara komencis sian UEA-karieron kiel „kanutano“. Tial mi alvokas vin ĉiujn konsideri, se eble, finance subteni la nepagipovajn esperantistojn. Eblas fari tion rekte, kiel miaj gepatroj, kiuj ĉiujare donace pagas la kotizon de sia malnova korespondantino, aŭ eblas fari donacon al Fondaĵo Canuto.

En jarfina retmesaĝo al la dumvivaj membroj mi jam petis ilin konsideri la subtenon al Fondaĵo Canuto. Ĝis la mezo de januaro alvenis por tio promesoj ĝis ĉ. 4 000 eŭroj. En la venontaj monatoj ni tenos vin ĝisdataj pri la evoluo de tiu ĉi kampanjo.

Loes Demmendaal



Ĉu ekzistas la ĉina lingvo?

Onidire la plej parolata lingvo de la mondo estas la ĉina kaj homoj en la tuta mondo pro tio lernas la ĉinan lingvon. Sed, ĉu vere temas pri la ĉina lingvo, la lingvo de ĉiuj ĉinoj? Fakte jes – kaj ne.

Kiam mi alvenis antaŭ unu jaro al Ĉinio por instrui la hispanan lingvon kaj Esperanton, mi konstatis ke homoj tie parolas malsamajn lingvojn, tute ne komprenatajn inter loĝantoj de diversaj regionoj, eĉ ene de la sama provinco, kaj eĉ homoj de apudaj urboj ofte havas tute malsimilajn lingvojn. Mi scivolemis pri tiu fenomeno kaj demandis, serĉis, esploris.

Iom post iom mi komprenis ke en Ĉinio ekzistas tute ne imagebla lingva mozaiko, lingva kaj kultura trezoro.

Jen kelkaj faktoj: En Ĉinio kunvivas 56 etnoj aŭ nacioj, multaj el ili kun propraj lingvoj, propraj skribmanieroj. Sed ene de tiuj lingvoj ekzistas amaso de t.n. “dialektoj”, plej ofte veraj apartaj lingvoj. Miaj gelnantoj, ekzemple, el diversaj provincoj, parolas dialektojn tute ne komprenatajn de aliaj samklasanoj, eĉ unu vorton ili ne povas kompreni.

La plej granda el tiuj nacioj estas la popolo hano kun la hana lingvo (hanyu). Kiam ni pensas pri ĉinoj, vere ni pensas pri hanoj. Tiu nomo devenas el la dinastio Han (202 a.K.-220 p.K.). Tiu popolo konsistigas 91% de la tuta ĉina loĝantaro. Ili distingiĝas disde la aliaj popoloj, kiuj parolas “etnajn lingvojn”, kun pli-malpli

150 variantoj, kiel la rusa, korea, mongola, tibeta, ujgura, kazaĥa ktp.

Kun la paso de la tempo kreiĝis unika sistemo por la ĉina skribado. Formiĝis tradicio kiu konsideras la ok plej parolatajn variaĵojn kiel “dialektojn”. Sed ili estas tiom malsimilaj kiel eŭropaj lingvoj el malsamaj lingvaj familioj. La dialektoj de la sudo estas multe pli malsimilaj al la plej granda grupo, la mandarena. La kvanto de dialektoj ne estas tute klara.

Ene de la han-dialektoj oni povus menciigi ĉefe la jenajn:

Kantona dialekto (guantong hua). Parolata ĉefe en la sudo, plej multe en Kantono, sudo de Guangxi, Makao, Honkongo (entute ĉirkaŭ 46 milionoj da parolantoj).

Gana. Parolata en Jiangxi kaj sudoriente en la provinco Hebei (21 milionoj).

Hakka. Ankaŭ parolata en la sudo, nordoriente de Kantono, Fujian kaj en parto de Tajvano (26 milionoj).

Mandarena. Tre vaste parolata en regionoj nordaj, centraj kaj okcidentaj (720 milionoj). Ĝi estas la lingvo de Pekino, Nankino ktp. Ĝi konsistigas la bazon de la norma moderna ĉina lingvo, konata kiel “ĉina lingvo”, putong hua, aŭ hanyu.

Norda Mino. Parolata ĉe la nordo de la provinco Fujian (10 milionoj).

Suda Mino. Parolata sudoriente, ĉefe en partoj de Zhejiang, Fujian, insulo Hainan (ankaŭ nomata Hainanhua) kaj Tajvano (26 milionoj).

Wu. Parolata en partoj de Anhui, Zhejiang kaj Jiangsu (36 milionoj).

Ankaŭ en parto de Malajzio estas parolata la ĉina lingvo, simila al la lingvo de Kantono.

Sed tio estas nur simpla priskribo pri la lingva situacio en Ĉinio. Ekzistas amaso da aliaj dialektoj. Wuhan hua, Shanghai Hua, Fuzhou hua, Shantou hua, ktp. Multaj estas parolataj nur en unu urbo, kaj eĉ en la urbo Kantono, kie nun mi troviĝas, ekzistas en kelkaj partoj de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj malsamaj dialektoj.

Kiamaniere ĉinoj solvas tiun komplikitan lingvan situacion? Diversmaniere. Ĝenerale ĉiuj ĉinoj parolas sian lokan lingvon aŭ dialekton. Sed krome ĉiuj parolas la putonghua-n kun aliaj ĉinoj kiuj havas malsaman gepatran lingvon. En bazaj lernejoj la instruado okazas en la propra lingvo aŭ dialekto. Ekde la mezlernejo la instruado okazas nur en la putonghua.

Alia estas la skriba lingvo. Dum tempopaso formiĝis unusola ĉina skriba lingvo. Tamen, post la ŝanĝoj dum la 20-a jarcento, ekzistas du skribmanieroj, la oficiala ĉina, kaj la malnova, ankoraŭ uzata ĉefe en Honkongo kaj Tajvano, sed facile komprenebla por ĉiuj. Ĉiuj ĉinaj ĵurnaloj estas en la oficiala ĉina lingvo. Televido ĝenerale uzas la putonghua-n (ne en Hongkongo).

Ni povus diri ke la putonghua estas la Esperanto de la ĉinoj. Ĉiuj parolas sian gepatran lingvon, kaj inter parolantoj de malsamaj lingvoj aŭ dialektoj oni parolas la putonghua-n.

Antaŭ nelonge, dum vizito al fabriko, la nuna Prezidanto de Ĉinio, s-ro Hu Jintao, diris al la laboristoj: “Ĉiuj ĉinoj devas bone koni la putonghuan por paroli kun aliaj ĉinoj, kaj Esperanton por paroli kun homoj el aliaj landoj”.

Ĝenerale ĉinoj ne diras “Esperanto”, ĉar ĝi estas vorto por ili malfacile prononcebla. Ili diras “shi jie yu” (monda lingvo). Konklude: ĉu la ĉina lingvo ekzistas? Mem decidu.

Augusto Casquero



Augusto Casquero inter ĉinaj belulinoj.

Du novaĵoj el la Esperanto-urbo

La 15-an de decembro 2008 okazis inaŭguro de tri novaj grandformataj esperantlingvaj inform-tabuloj ĉe la kajoj de la stacidomo en Herzberg.

La unikan eventon partoprenis la fervoja ĉefo Detlev Krusche, la urbestro Gerhard Walter, la GEFA-prezidanto Achim Meinel, BSW-reprezentantoj, ĵurnalistoj kaj E-geamikoj el Herzberg. La fervoja ĉefo ĝojis, ke Herzberg nun estas la oficiala Esperanto-urbo.

Jam antaŭ pli ol 30 jaroj li aŭdis, ke homoj en Herzberg praktikas Esperanton sub gvido de la tiutempa stacidomestro kaj mondfama esperantisto Joachim Giessner. G. Walter kaj D. Krusche emfazis la unikan varbefikon kaj por la stacidomo kaj por la urbo kaj por la lingvo Esperanto.

Germanlingvan tekston pri la evento kun la foto vi povas trovi sur la hejmpaĝo de la urbo Herzberg am Harz: Herzberg – la Esperanto-urbo sub: Aktuelles (aktualaĵoj).



Infanoj de la baza Nikolaus-lernejo en Herzberg, kiu partoprenas en Comenius-projekto kun la lernejoj en Bar Hill, Britio, kaj Miskolc, Hungario, sendas novjarajn bondezirojn al la legantoj de nia revuo. La Esperanto-kurson gvidas Otto Kern kaj Helga Mädlich. Zsófia Kóródy filmis la salutadon. La filmeton „Bondeziroj de infanoj“ vi trovos sur la hejmpaĝo: www.esperanto-urbo.de.

P. Zilvar, H. Mantz, H. Schicke kaj Zs. Kóródy



Ĉiutage ĉ. 2 000 pasaĝeroj povas vidi la novajn ŝildojn.



**Esperantic Studies
FOUNDATION**

Rekone al plurjara fruktodona kunlaboro,
ESF gratulas al

lernu.net
kaj
edukado.net

premiitaj dum la 93-a UK
pro elstara Esperanto-agado.

www.esperantic.org

DUMVIVAJ MEMBROJ

Germanio: D. Bemann. Italio: G. Polerani.
Kroatio: R. Imbert. Ukrainio: R. Tverdstup.

SOCIETO ZAMENHOF

Belgio: N. Kovačić.

DONACOJ

Ĝis la fino de 2008

Ĝenerala kapitalo: Francio: J. Rapley (legaco) 7 500,00. Germanio: M. Gatter (legaco) 1 533,88. Kanado: B. Waters (heredaĵo) 142 857,14. *Sumo en 2008: 279 425,15.*

Konto Afriko: Brazilo: J.M. Marques 95,24. Nederlando: C. & R. Bossong 25,00; A.J. Korfage-de Jong 75,00. Norvegio: E. Matland 100,00. *Sumo en 2008: 1 858,69.*

Fondaĵo Ameriko: Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00. Svedio: J. Hammarberg 18,86. Usono: R. Glossop 18,85; J. Johnson 7,54; J. Spickler 8,16. *Sumo en 2008: 2 173,27.*

Konto Arabio: Nederlando: E. Burg 100,00. *Sumo en 2008: 100,00.*

Fondaĵo Azio: Japanio: Y. Mine, K. Syozi – po 81,77; H. Matuda 32,71; A. Hosida, U. Kobayasi, T. Nakamiti, R. Sasaki, E-Rondo de Ehime – po 16,35; M. Nakazima 40,88; S. Turuta 20,44; N. Yoshida 29,44; T. Arai, H. Egawa, H. Harada, H. Hazama, T. Honda, K. Kuneda, K. Kuriki, H. Nakamura, M. Nakatu, T. Nishino, Y. Sasaki, T. Tadaisi, Y. Tanida, T. Unoki, T. Yamada, M. Yasumura, T. Yokoyama, E-populariga Asocio – po 15,80. *Sumo en 2008: 2 606,45.*

Konto Novjorka Oficejo: Usono: R. Glossop 18,85; L. Gregg, J. Johnson – po 7,54. *Sumo en 2008: 77,65.*

Fondaĵo Canuto: Aŭstralio: Anonima 50,32. Britio: M. Cayley 30,00. Francio: Anonima 20,00. Germanio: Gisela & Georg Macioszek – po 118,00. Japanio: A. Morita 200,00. Nederlando: A. & H. Bakker 1 383,00; E. Burg 250,00; F. Kat 200,00; T. van Huis-Staritsky 60,00; R. Moerbeek 25,00; R. Schmeits-Heijnen 5,00. Nov-Zelando: D.

Dewar 50,40. Svedio: U. Luin 30,00; K. & O. Hansen 35,61. Svislando: Anonima 181,51. Partoprenantoj de la 93-a UK: 817,90. *Sumo en 2008: 9 280,20.*

Fondaĵo Espero: Aŭstralio: Anonima 50,31. Nederlando: T. van Huis-Staritsky 80,00. *Sumo en 2008: 1 271,15.*

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Germanio: A. Doçi 27,52. Partoprenantoj de la 93-a UK: 1 454,00. *Sumo en 2008: 6298,61.*

Volontula Fondaĵo: Finnlando: S. Mynttinen 200,00. Nederlando: E. Burg 250,00; Anonima 67,89. Partoprenantoj de la 93-a UK: 185,00. *Sumo en 2008: 4 482,55.*

Konto Informado: Aŭstralio: Anonima 63,40. *Sumo en 2008: 63,40.*

Konto Hans: Nederlando: E. ten Hagen-Renses 1 500,00. *Sumo en 2008: 3 500,00.*

Konto UN kaj Unesko: Nederlando: E. Burg 250,00. *Sumo en 2008: 250,00.*

Konto Wüster: Aŭstralio: Anonima 50,31. *Sumo en 2008: 50,31.*

Konto Oficeja Ilaro: Aŭstralio: Anonima 13,08. Nederlando: F. Kat 150,00. *Sumo en 2008: 163,08.*

Domrenovigo: Finnlando: S. Mynttinen (biblioteko) 200,00. Nederlando: A. & H. Bakker 1 000,00 + (biblioteko) 3 000,00; J.W. Moonen (biblioteko) 100,00. *Sumo en 2008: 8 340,00.*

Ĝenerala kaso: Francio: R. Triolle 240,90. Germanio: W. Ehlers 18,00; M. Gohly 13,00; J. Radam 41,00. Nederlando: F. Kat 150,00; R. Moerbeek 50,00; Rot. E-Soc. Merkurio 250,00. Usono: L. Gregg 7,54; D. Halley 77,58; J. Wright 15,08; Anonima 22,24. *Sumo en 2008: 2 757,74.*

Al ĉiuj koran dankon! UEA



Statistiko de la UK

Bjalistoka UK superis la unuan milon

Kiel atendite, la nombro de aliĝintoj al la 94-a Universala Kongreso en Bjalistoko (25 julio – 1 aŭgusto 2009) superis la unuan milon jam dum la unua kotizperiodo, kiu daŭris ĝis la fino de decembro.


La 15-an de januaro estis registritaj Lentute 1087 kongresanoj el 56 landoj. Ĝis tiu dato la Kongresa Fakto de UEA ankoraŭ ne ricevis de ĉiuj perantoj la aliĝilojn, tiel ke la fina rezulto de la unua periodo fakte estas pli multnombra.

La kongreslando Pollando tuj konkeris la unuan lokon en la statistiko, superante la tradicie fortan

Francion, kiu ofte liveras al UK-oj eĉ pli da kongresanoj ol la gastiganta lando. Ĝis la mezo de januaro estis registritaj 209 kongresanoj el Pollando kaj el Francio 178. Kun pli ol cent aliĝintoj reprezentigas ankaŭ Germanio (107) kaj Japanio (104). Inter la 12 plej multnombraj landoj estas krome Nederlando (50), Italio (40), Belgio (39), Brazilo (31), Svedio (27), Britio (24), Rusio (23) kaj Svislando (20).

Rozkład jazdy pociągów stacji Białystok									
ważny od 14.XII.2008 do 12.XII.2009									
TRAJNOHORARO ĈE LA STACIO BJAŁISTOKO									
validas ekde 14.12.2008 ĝis 12.12.2009									
Stacio	Horaro	Stacio	Horaro	Stacio	Horaro	Stacio	Horaro	Stacio	Horaro
Białystok	08:00	Warszawa	10:00	Katowice	12:00	Łódź	14:00	Bydgoszcz	16:00
Białystok	09:00	Warszawa	11:00	Katowice	13:00	Łódź	15:00	Bydgoszcz	17:00
Białystok	10:00	Warszawa	12:00	Katowice	14:00	Łódź	16:00	Bydgoszcz	18:00
Białystok	11:00	Warszawa	13:00	Katowice	15:00	Łódź	17:00	Bydgoszcz	19:00

Foto: Przemysław Wierzbowski



Hamburgo en retrospektivo. Ivo Lapenna. Kopenhago: Horizonte, 1977 (tria kompletigita eld.). 11+151p. 21cm. Interpreto de la aŭtoro pri sia forlaso de UEA en 1974. Prezo: €16,50. Sesona rabato ekde 3 ekz.



Kongresu en la naskiĝurbo de Zamenhof!

Glumarkoj (5,5x4cm) por la ĉi-jara UK haveblas ĉe la Libroservo de UEA. 10-peca folio kostas €1,20. Triona rabato ekde 3 folioj.

La periodaĵoj de UEA kaj TEJO bonvenigas ankaŭ vin kiel sian leganton en 2009!

Esperanto

11 numeroj jare, kun po 24 paĝoj numere.
€ 38,00*

KONTAKTO


6 numeroj jare, kun po 16 paĝoj numere.
€ 23,00*



tejo
tutmonde
tutmonda esperantista junulara organizo

6 numeroj jare, kun po 16 paĝoj numere.
€ 12,00*

*La prezoj varias laŭlande. Konsultu la kotiztabelon de UEA. Abonu rekte de UEA, aŭ pere de via landa peranto.



**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktoroj:
Probal Dasgupta, Humphrey Tonkin.
Recenzoredaktoroj:
Frank Nuessel, Federico Gobbo.
Interlingvistika redaktoro: Mark Fettes.
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 36224,
NL-1020 ME Amsterdam, Nederlando.
Aperas trifoje jare.
Individua abono: 70,00 eŭroj.
Institucia abono: 196,00 eŭroj.
Abonu pere de la Libroservo de UEA.

Fondaĵo Canuto

**Multaj arde deziras membriĝi en UEA,
sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo
Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun
tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!**




**En 2008 163 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al**

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK, kaj specialan donaceton. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



NIAJ PASINTJARAJ ELDONAĴOJ



Tuj apude. Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA. Humphrey Tonkin. Ilustrita poŝformata gvidilo pri la ĉirkaŭaĵo de la CO. 56p. 20cm. Rotterdam: UEA, 2008. ISBN 9789290171065. €7,50.



Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Konkiza retrorigardo al la unua cent jaroj de UEA. Ilus. 126p. 24cm. Rotterdam: UEA, 2008. ISBN 9789290171058. €15,00.




Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. 38p. 21cm. Rotterdam: UEA, 2008 (3a eld.). ISBN 9789290171041. €4,50.



Naturaj vortordoj en Esperanto. Wim Jansen. Resumo el elektitaj temoj, traktitaj en la doktora disertacio de la aŭtoro *Woordvolgorde in het Esperanto*. 40p. 21cm. Rotterdam: UEA, 2008. ISBN 9789290171034. €4,50.



Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj. Louis Couperus. Trad. Gerrit Berveling. Deko da rakontoj de nederlanda verkisto ne aparte fama dumvive, sed lastatempe „remalkovrita“. 180p. 21cm. Rotterdam: UEA, 2008. ISBN 9789290171027. €9,90.



La trezoro. Hussain M. Al-Amily. Red. G. Berveling, M. Cayley, R. Corsetti. Kolekto de 3 000 proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo; kun klarigaj notoj. Ilus. 137p. 24cm. Rotterdam: Araba Komisiono de UEA, 2008. ISBN 9789290171010. €15,00.



Internacia Kongreso Universitato 2008. Red. J.A. Vergara. Prelegoj de H.M. Maitzen, B.-A. Wickström, J. Wells, K. Sayadpour, J. Pietiläinen, G. Greatrex, M. Gutiérrez González, M. La Torre, P. Dasgupta, B. Ragnarsson. 115p. 30cm. Rotterdam: UEA, 2008. €15,00.



Aziaj kontribuoj al esperantologio. Aktoj de la 30-a Esperantologia Konferenco en la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, Jokohamo 2007. Gotoo Ma, Yamasaki Tida, Hūgimoto Sibayama, Usui Sakaguchi. Red. U. Lins. Tekstoj de ok prelegoj. 61p. 30cm. Rotterdam: UEA, 2008. ISBN 9789290171072. €9,90.

Ĉe la Libroservo de UEA triona rabato por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj de la sama titolo.